1986 februaro
79a jaro
n-ro 962 (2)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Esplori Esperanton postulas fakajn konsultilojn

Vi trovos

en ĉi tiu numero niajn tradiciajn februarajn rubrikojn pri la pasintjaraj libromerkato kaj stato de la membraro de UEA. Se vi estos tiel diligenta kompari la membrostatistikon kun tiu pri 1984, vi trovos, ke ĝi iomete malsamas. Tiel, ĉar ni ricevas kelkajn aliĝojn eĉ post la koncerna jaro, (kvankam vi akurate pagas vian kotizon, ĉu ne?). Pro la tiupaĝa spacomanko, ni ĉi tie notas, ke okazis kontentiga kresko de preskaŭ 4% tra ĉiuj kategorioj de individua membreco kaj tra la plimulto de la landoj. Menciindas Francio, FR Germanio, Hispanio, Irano, Italio kaj Jugoslavio. El la landoj kun pli malgrandaj movadoj elstaras Kolombio, multe dank' al ĝia peranto, kaj Korea Respubliko. Kontraŭ la kreska tendenco, jam de pluraj jaroj falas la membraro en Britio, Svedio kaj Svislando. La membraro en Brazilo kaj Pollando nun stabiliĝis.

Enhavo

21 Interlingvistiko: Faksperta sukceso montras bezonojn (Klaus Schubert)
22 Libromerkato: Kio pleje vendiĝis (dum 1985);
Universitatoj: Unuafoje en usona altlerneja studprogramo
23 Centro de Esploro kaj Dokumentado: Kiel home kaj maŝine superi la lingvobaron?;
Ĝuste nomi la rezolucion
24 Internacia Jaro de Paco: Multa informa agado
25 Hujucz (Hu Yuzhi, 1896-1986) (Ulrich Lins);
Faka agado: AIS ekfunkcias
26 Loka agado: Rompi la izolitecon ĉe la periferio (Bertram Russell);
20a ekspozicio (Takeuti Yosikazu)
27 Reagoj: Nepermeseblaj eldiroj (Eskil Svane); Decus esti singarda (Hans Amund Rosbach); Mi gratulas (Hussain Mohammed Al-Amily); Granda loka prestiĝo (Siegfried Schlumberger)
29 Antaŭ la 71a UK: La misteroj de la ĉina skribo (A. Cherpillod);
31 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 71a Universala Kongreso)
32 Recenzoj: *Germana antologio (ekde la plej frua epoko ĝis ĉ. 1700)*, red. O. Brodt (William Auld); *La mortosonorilo de Chamblay* de Karolo Piĉ (Edward Ockey)
34 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
35 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
38 Oficiala informilo (de la Centra Oficejo de UEA)
39 La membraro de UEA en 1985 (statistiko);
Nekrologoj
40 Anoncetoj

La kovrilo

reprezentas esploradon. Objektivaj kaj ĝisdataj informoj pri la Internacia Lingvo ankoraŭ ofte mankas en nacilingvaj konsultlibroj. Tio ne estas la kulpo de iliaj redaktoroj. Ĉu ĉiu landa aŭ faka asocio havas komisionon, kiu kontrolas la enhavon pri Esperanto de popularaj kaj fakaj konsultlibroj nacilingvaj kaj provizas pruveblajn informojn kaj ĝisdatigojn? Pri tia plej fundamenta informa agado temas nia ĉefartikolo. (Foto: Unesko/Bablin.)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 36 15 39.
Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**
Voĉlegata por blinduloj.
Redaktoro: Geoffrey Sutton.
Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US $ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.
Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).
Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).
Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.
Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.
Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio; ☎ (03) 770 64 86.
Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.
Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.
Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 42 37 14 73.
Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.
Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.
Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 962 (2), februari 1986. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Faksperta sukceso montras bezonojn

Ni neofte havas recenzon kiel ĉefartikolon, sed espereble ĉiu komprenas la gravecon de la aperigo de informoj pri elektitaj libroj kaj artikoloj en kaj pri Esperanto en grava internacia bibliografio. Bibliografioj estas baza ilo de la scienca esplorado. La recenzinto, d-ro Klaus Schubert, estas sintaksisto, laboranta por plurlingva komputila tradukprojekto de la nederlanda kompanio BSO, kiu utiligas Esperanton kiel pontolingvon.

1983 MLA International Bibliography of Books and Articles on the Modern Languages and Literatures (Internacia bibliografio de libroj kaj artikoloj pri la modernaj lingvoj kaj literaturoj). Volumo 3: *Linguistics* (Lingvistiko). Novjorko: Modern Language Association of America (62 Fifth Avenue, New York, NY 10011, Usono), 1984.

En FR Germanujo nun okazas tio, kion ni delonge timas: Ministerio taskas ekstermovadajn lingvistojn ekspertizi pri Esperanto. Kiel tia eksterulo aliros la problemon? Unu el la plej kutimaj labormetodoj estas konsulti bibliotekojn kaj bibliografiojn. Kaj ni ja scias, ke pri Esperanto oni multe verkis. Multegaj aŭtoroj propagandas por ĝi, multaj celas flegi ĝin kaj kelkaj studas ĝin science. Aperis diverskvalitaj lingvistikaj detalstudoj, kompletaj gramtikoj, instruaj tekstolibroj, reformplanoj kaj pledoj por netuŝebleco, vortludoj kaj lingvaj respondoj. Sed ĉu la ekstera eksperto ekscios tion? La granda plejparto de tiuj verkaĵoj pri Esperanto aperis ekster la ĝenerala libromerkato kaj en malmulte komprenata lingvo. Eĉ argumentadoj por Esperanto ofte aperas en la lingvo mem, kvazaŭ por prediki al kredantoj. La verkoj pri Esperanto penetras nek vendajn, nek bibliografiajn katalogojn. Ili ofte ne estas profesinivele redaktitaj kaj eldonitaj. Ne venante de la kutimaj lingvistikaj eldonejoj, kiuj varbas ĉe sciencaj bibliotekoj, esperantaĵoj trafas en universitatajn bibliotekojn ofte nur pro testamento, do malaktualaj.

Unu tre alte taksinda escepto, kiun esperinde trovos la ekspertoj, estas la ĉiujara bibliografio de la usona Modern-Lingva Asocio *(Modern Language Association)*. Kun dekmilo da enskriboj ĝi estas unu el la grandaj fontoj de referencoj pri ĝenerala lingvistiko. Ĝi kompreneble havas konkurantojn. Kompare kun la simile altkvalita *Bibliographie linguistique*, ĝi estas du jarojn pli rapida, sed malpli ampleksa kaj iom pli koncentrita al usonaj kaj anglalingvaj publikaĵoj. Tiuj branĉoj de la lingvistiko, kiuj estas malfacile observeblaj el Usono, estas malpli komplete reprezentitaj en la MLA-bibliografio. Unu ero de ĝi tamen estas elstara, nome la ĉapitro pri interlingvistiko, de kelkaj jaroj zorgata de Humphrey Tonkin. La volumo pri 1983 ampleksas ducentkvindekon da enskriboj, naŭdek-procente pri Esperanto. La ĉapitro estas iom neprestiĝe enkadrigita inter inventitaj lingvoj (el utopiaj romanoj ks.), gestolingvoj kaj komputaj simbolsistemoj (kiujn oni ofte malprave nomas lingvoj). Kompense tamen Esperanto estas, samrange kun la hispana, la kvina plej ofte traktita unuopa lingvo en la bibliografio (post la angla, germana, franca kaj rusa). Ankaŭ dise en la libro troviĝas verkaĵoj en aŭ pri Esperanto, troveblaj per temregistro.

La laboro de Tonkin estas altvalora kontribuo al la nun nepre bezonata fakiĝo kaj serioziĝo de la interlingvistiko kaj al ĝia same nepra aliĝo al la ĝenerala lingvoscienco. Ni tamen ne pretervidu, ke eĉ ĉi tiu faksperta sukceso estas nur unu paŝo el longa migrado. Mencio en bibliografio ja ne garantias, ke scienca biblioteko sukcesos havigi al ekstermovada eksperto libron, aperintan en Laroque Timbaut aŭ artikolon el *Hungara fervojista mondo*. Tamen Tonkin almenaŭ provizas la bibliografian ekzistopruvon, kiun bibliotekoj ofte postulas, antaŭ ol akcepti interurban aŭ internacian serĉomendon.

Pli detale studante la iom pli ol kvarpaĝan kontribuon en la MLA-bibliografio, oni tamen konsciiĝas pri kelkaj el la plej gravaj bezonoj de la interlingvistiko kaj esperantologio:

– Ni ne nur babilu inter ni pri la beleco de Esperanto, sed ni turnu nin eksteren;
– Ni ne pledu, sed analizu objektive;
– Ni do verku pri Esperanto pli multe en etnaj lingvoj;
– Ni pli ofte publikigu en vaste legataj lingvistikaj revuoj kaj ĉe fakaj eldonejoj, kiuj atingas la sciencan publikon;
– Por povi fari ĉion ĉi, ni levu nian lingvotraktadon al aktuala scienca nivelo;
– La interlingvistiko ne plu estu amatora hobiejo. Ni igu ĝin integra elemento de la ĝenerala lingvistiko.

Humphrey Tonkin sukcesis produkti guton malgrandan. Kiuj igos ĝin frapi konstante?

Klaus Schubert

LIBROMERKATO

Kio pleje vendiĝis

Jen ĉi-sube nia listo de la libroj, kiuj pleje vendiĝis tra la Libroservo de UEA dum la jaro 1985:

1.	*Faktoj kaj fantazioj (Boulton)*	36,00
2.	*Gerda malaperis! (Piron)*	3,90
3.	*Esperanto aŭtodidakte (Childs-Mee)* .	24,00
4.	*Esperanta antologio (red. Auld)*	60,00
5.	*Plena analiza gram. (Kalocsay/Waringhien)*	48,00
6.	*Praktika bildvortaro de Eo*	14.40
7.	*Diskriminacio (red. Corsetti)*	21,00
8.	*Li kaj ni (red. Haupenthal)*	66,00
9.	*Ĉu vi konas la teron? (Dudich)*	12,00
10.	*Kumeŭaŭa (Sekelj)*	9,00
11.	*Amuza matematiko (Arnaudov)*	9,90
12.	*Robaioj (trad. Waringhien)*	12,00
13.	*Eo and English Dictionary (Wells)*	23,70
14.	*Maks kaj Morits (Busch/trad. Fischer)*	14,40
15.	*Kiuj semas plorante... (Tófalvi/Kníchal)*	15,00
16.	*La lingva esenco de Eo (Atanasov)* ...	27,00
17.	*Lingvistikaj aspektoj de Eo (Wells)* ...	12,00
18.	*Pordoj (MacGill)*	8,10
19.	*Plena ilustrita vortaro (Waringhien)* ..	138,00
20.	*Diccionario de bolsillo (Paluzie-Borrell)*	7,50

Same kiel en 1984, la furora libro de la pasinta jaro denove estis la legolibro por progresintoj *Faktoj kaj fantazioj* de Marjorie Boulton. Vendiĝis 785 ekzempleroj dum la jaro, entute 1 691 ekzempleroj ĝis la fino de 1985. Kompare kun tio, *Gerda malaperis!* de Claude Piron, je preskaŭ dekono de la prezo, estas en alia kategorio, kvankam vendiĝis 506 ekzempleroj.

Esperanto aŭtodidakte; Saluton! altiĝis de la kvina al la tria loko. *Esperanta antologio* tenas sian lokon, kaj *Plena analiza gramatiko* sukcesis altiĝi je unu loko en la jara statistiko, kvankam ĝi dum pluraj monatoj estis elĉerpita.

Ni povas esti iom kontentaj pri *Diskriminacio*, kiu ĝuas lokon iom pli altan ol oni eventuale atendis. Atentokapta estas la pozicio de *Li kaj ni; Festlibro por la 80a naskiĝtago de Gaston Waringhien*, se oni konsideras ĝian altan koston, kaj kuraĝiga estas la konstato, ke sciencaj libroj okupas i.a. la naŭan kaj dek-unuan lokojn. Tio bone aŭguras por *Vetero kaj klimato de la mondo*, kiu aperos ĉe SEC/UEA antaŭ julio. Notindas, ke la lastajn lokojn de la unuaj 20 plej venditaj libroj okupas eldonaĵoj, de kiuj UEA vendis ne multe pli ol cent ekzemplerojn.

La sumo de la libroservaj vendoj ĉe UEA en la pasinta jaro estis iom pli ol 284 000 guldenoj, kompare kun 282 000 en 1984 kaj 173 000 en 1983, do stabila situacio.

gs

UNIVERSITATOJ

Unuafoje en usona altlerneja studprogramo

La unuan fojon okazis Esperanto-kurso en la oficiala studplano de usona universitato. Temas pri deksemajna elementa kurso ĉe Universitato de Kalifornio en Santa Barbara, kiun aranĝis prof. Albert Lindeman. La kurson, "Enkonduko en la studadon de fremdaj lingvoj per Esperanto", gvidis s-ino Dorothy Holland kaj Arthur Eichenberry kun la partopreno de dudek kvin studentoj.

Oni planas ripeti la kurson dufoje en la nuna jaro kaj en la aŭtuno oferti mezgradan kurson konversacian kaj literaturan.

La telefonnumero de UEA, same kiel ĉiuj lininumeroj en la telefondistrikto de Roterdamo (010), komenciĝos ekde la 3a de majo per la aldona cifero 4. Por atingi la Centran Oficejon, bonvolu ekde tiu dato elekti: + **31 10 436 15 39.**

La loka ĵurnalo *Santa Barbara News Press* publikigis la apudan foton kun ampleksa artikolo pri la evento.

Foto: Santa Barbara News Press

Instruisto Dorothy Holland kaj parto de la kurs-akompana ekspozicio de Esperantaj literaturo, filatelaĵoj ks. en la biblioteko de la filio de Universitato de Kalifornio en Santa Barbara.

Kiel home kaj maŝine superi la lingvobaron?

La 4a jara Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado, organizita de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvo-problemo (CED), okazis en Novjorko la 13an kaj 14an de decembro. La konferenco havis du temojn: "Superi la lingvobaron: La homa/maŝina rilato" kaj "La ideo de universala lingvo".

Françoise Cestac, direktoro de la Traduka Sekcio de UN en Novjorko, malfermis la unuan tagon per diskuto pri la rapida evoluigo de teknologio pri tradukado. La ĝenerala temo de maŝinoj por tradukado okupis la unuan sesion de la konferenco. Margareta Bowen, ĉefo de la Interpretada kaj Traduka Sekcio ĉe Universitato de Georgetown, i.a. pledis por konsidero al la konsumanto de la tradukoj: neniu teorio pri la tradukado povas ignori la personon, al kiu traduko estas celita.

Muriel Vasconcellos, ĉefo de Terminologio kaj Maŝintradukado ĉe Tut-Amerika San-Organizaĵo, proponis, ke la homa/maŝina rilato en la tradukado estas kontinuaĵo, ekde nenia ĝis plena aŭtomatigo. En sia kompetenteco kiel direktoro por teknologio de la kanada ŝtata Traduk-Oficejo, Fernand Gobeil donis superrigardon pri la laboro de la oficejo, kiu respondecas pri ĉiuj tradukbezonoj de la federacia administrado kaj produktas preskaŭ 300 milionojn da vortoj jare.

Linn H. Downs, komputa konsilisto el Nov-Hampŝiro, kaj Veronica Lawson, konsultisto kaj tradukisto el Londono, prezentis kontrastajn superrigardojn pri la progreso en maŝintradukado el la usona kaj eŭropa perspektivoj. Downs montris al kelkaj trankvilaj ŝanĝiĝoj: programoj funkcias per daŭre pli malgrandaj maŝinoj, pli da lingvoj estas trakteblaj, multlingvaj sistemoj ekaperas kaj redaktaj sistemoj estas pli haveblaj. Lawson substrekis la bezonon de facila rilato inter la homa tradukanto kaj la maŝino.

La duan sesion prezentis membroj de la lingvoservoj de UN. Nigel Cassar de la Terminologia Sekcio, en "Kompute helpata tradukado ĉe UN", revuis la laboron de la lingvoservoj. Apollo Wu, de la Ĉinlingva Tradukservo, kaj Harald Hille, de la Dokumenta, Konsulta kaj Terminologia Sekcio, diskutis pri "La ĉina lingvo kaj teknologiaj ŝanĝoj". Bruce Boeglin, ĝis antaŭ nelonge interpretisto ĉe UN, revuis du eksperimentojn pri t.n. defora konferenca priservado, per kiu interpretistoj en la UN-ĉefsidejo en Novjorko estis persatelite ligitaj kun konferencoj en Bonaero kaj Vieno.

La lasta sesio de la tago enhavis tri diverstemajn referaĵojn. Dolores de Castro, direktoro de Terminologia Informbanko ĉe Univ. Simón Bolívar en Karako, Venezuelo, priskribis la metodojn, uzatajn en ŝia universitato por labori en multlingvaj situacioj kun limigita maŝinaro kaj aliaj malhelpoj karakterizaj en la tria mondo. Youssef Mahmoud priskribis la Lingvotrejnan Programon ĉe UN.

Zelda Irene Brooks, de Kolegio de Staten Island, montris vidbendon de Frank Otto (Univ. Brigham Young) pri la uzado de viddiskoj en fremdlingva instruado.

La dua tago de la konferenco estis la unua en serio de tri kunvenoj, organizitaj omaĝe al la Centjara Jubileo de Esperanto. Dua konferenco estas planata por Ôsaka, Japanio, en aŭgusto, kaj tria en Parizo pli malfrue ĉi-jare. Grégoire Maertens, prezidanto de UEA kaj financ-inspektoro ĉe Ministerio pri Financo en Bruselo, malfermis la tagon per ekzamenado de la lingva situacio en la mondo, referante al la ekzemplo de Belgio, kie klopodoj stimuli dulingvismon grandparte malsukcesis, kaj la lando certagrade disiĝis. Saul Levin, profesoro pri la klasikaj lingvoj (Ŝtata Univ. de Novjorko/Binghamton), prezentis pli skeptikan vidpunkton. Dum ni povas festi la centjaran eltenon de Esperanto, kaj kvankam esperantistoj faris gigantan klopodon popularigi la lingvon, ĝi, laŭ li, malsukcesis enradikiĝi. Zamenhof mistaksis la povon de tradiciaj lingvokutimoj inter la elito kaj ne kapablis igi Esperanton la lingvo de vera komunumo.

Ĝuste nomi la rezolucion

La ciferaro XI.4.4.218, per kiu ni signis la rezolucion pri Esperanto de la 23a Sesio de la Ĝenerala Konferenco de Unesko en Sofio, laŭ nia kompreno ne en si mem estas erara (ĝi respondas al la ciferaro de la montevidea Rezolucio IV.1.4.422-4224). Ĝi tamen referencas al la programeroj de la konferenco, ne al la poste eldonita rezoluciaro.

Unesko rekomendas, ke referencoj al la rezolucio pri Esperanto, kiu nun oficiale nomiĝas Rezolucio 11.11, aperu en unu el la sekvaj formoj: **Rezolucio 11.11, adoptita de la Ĝenerala Konferenco en ĝia 23a sesio** aŭ **23/Rezolucio 11.11.**

La traktaĵon de Levin, titolitan "Ĉu artefarita lingvo povas esti pli ol hobio?", sekvis tiu de Karen Johnson-Weiner (Ŝtata Universitato de Novjorko/Potsdam): "El kio konsistas vivipova parolkomunumo?". Ŝi malkonsentis kun Levin pri la difino de parolkomunumo, proponante ke la pluvivo kaj prospero de ĉiuj lingvoj estas bazita sur sociaj valoroj kaj ke tiaj valoroj, plialtigitaj al la nivelo de "kredosistemo", kuŝas ĉe la koro de konstruita lingvo kiel Esperanto.

Humphrey Tonkin, ankaŭ de Ŝtata Universitato de Novjorko/Potsdam, en "Esperanto: Revuo de ĝia nuna situacio", emfazis, ke la origino de la Internacia Lingvo fontis el multe pli ol ideo pri lingvo.

La lasta traktaĵo de la mateno, de Wolfgang Schirmacher (Nova Lernejo por Socia Esplorado kaj Univ. de Hamburgo), traktis la temon "La dua baro de la lingvo", spekulaciante pri la karaktero de la estonta socio, en kiu memprogramantaj komputiloj regos la tradukadon, kaj homoj estos liberaj por esplori lingvan plursencecon.

La dua sesio de la tago ofertis tri referaĵojn pri historiaj temoj. Gerhard Strasser (Ŝtata Univ. de Pensilvanio) esploris provojn en la 17a jarcento revivigi la latinan kiel universalan lingvon, Michael Smith (Universitato de Georgetown) prelegis pri bolŝevistaj provoj raciigi lingvon, kaj Hilda Radzin (Univ. de S-ta Johano) prezentis kelkajn komunajn facetojn de konstruitaj lingvoj.

La tria sesio komenciĝis per "Ĉu la posedo de komuna lingvo reduktas la probablecon de milito?". La atestaĵoj, opiniis prof. Ronald Glossop, ne liveras konkludon: lingvaj diferencoj fakte ne estas tre signifaj en internaciaj konfliktoj. Tamen, la lingvo estas decidige grava kiel dimensio en naciismo, kiu siavice estas grava variaĵo en la evoluo de konfliktoj. Profesoron Glossop (Univ. de Suda Ilinojso, Edwardsville) sekvis Jane Edwards (Ŝtata Univ. de Novjorko en Potsdam). Edwards traktis la bezonon kaj mankon de taŭga esplorado pri la fenomeno Esperanto. Reale, la Esperanto-movado estas "kaj volontula kaj alternativ-socia strukturo". Ĝi estas studebla nur de esploristo kun scio de Esperanto, sed kleruloj bedaŭrinde emas (malĝuste) opinii ĉiujn parolantojn de Esperanto tendencaj al ĝia favoro. Sekve la sola maniero resti "objektiva" ŝajnas esti per daŭrigo de nescio.

La lasta referaĵo, revuo de "La UN-projekto por Internacia Junulara Jaro kaj la uzo de Esperanto kiel intera laborlingvo", estis prezentita de d-ro Marshall Whithed.

Raporto pri la konferenco aperos en du volumoj, kiuj kostos po 10 dolarojn. Antaŭmendojn akceptas CED/UEA, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017, Usono. Ĉekoj estu pageblaj al "UEA/NY".

INTERNACIA JARO DE PACO

Multa informa agado

Esperantistoj antaŭis la nunan Internacian Jaron de Paco per la okazigo de Tago de la Paco en la pasinta Universala Kongreso. La Tagon, pri kiu ni apenaŭ raportis, kompetente aranĝis Japana Esperanto-Instituto (JEI). En la sama semajno estis la 40aj datrevenoj de la atombombaj tragedioj de Hiroŝimo kaj Nagasaki (la 6an kaj 9an de aŭgusto).

La agado de JEI inkluzivis la eldonon de la broŝuro *Tero-simo Ne!* pri la efikoj de la faligitaj atombomboj, montradon de la kolora dokumenta filmo *Profetaĵo* (43-min., 16mm.) pri la sama temo, kiun

***La prezidanto de UEA, Grégoire Maertens (dekstre), transdonas al la urbestro de Aŭgsburgo ekzempleron de la libro* Hirosima-Nagasaki.**

rigardis ĉirkaŭ 300 kongresanoj, kaj la 70-panelan ekspozicion "Hirosima-Nagasaki".

Grupoj ks., kiuj deziras trakti la temon "paco", povas senpage mendi la broŝuron de s-ino Michela Lipari-Sato (Viale Giulio Cezare 223, I-00192 Roma, Italio; tel. (06) 380 839), kiel ankaŭ ricevi informojn pri haveblaj diapozitivoj, ekspozicia materialo, la supre menciita filmo kaj alia filmo, *Redonu la homaron* (20-min., 16mm.). La broŝuro entenas adresojn de japanaj Esperanto-grupoj, kiuj volonte kunlaboras kun eksterlandaj kluboj por la paco.

La multa laŭdinda aktivado eventuale havus ankoraŭ pli da forto, se ĝi estus pli emfazinta la respondendajn demandojn kial oni devis faligi la atombombojn kaj ĉu la ĝisnuna posedo de nukleaj armiloj ne portis pli da paco.

Estas notinde, ke JEI kolektis 10 175 guldenojn por la agado kaj restas preta kunlabori por okazigi Tagon de la Paco ankaŭ estontece. JEI proponas, ke la Komitato de UEA ĉiujare decidu, kiu lando organizu tian Tagon en la UK. **gs**

Hujucz (1896-1986)

En septembro 1985, okaze de sia 35-jara jubileo, *El popola Ĉinio* portis sur la titolpaĝo koloran portreton de Hu Yuzhi (Hujucz), la prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo. Ĵus venis la informo, ke li mortis la 16an de januaro en la aĝo de 89 jaroj. Fotoj de Hu Yuzhi estas raraj, faktoj pri lia vivo eĉ pli. Sed tio, kion ni scias, sufiĉas por permesi la juĝon, ke mortis la plej influa persono, kiun dum la daŭro de sia ekzisto havis la ĉina movado.

Studinte anglan literaturon en Hangzhou, Hu Yuzhi jam en 1919 kune kun Ba Jin (Bakin) kaj aliaj fondis Ŝanhajan Esperanto-Asocion, kiu fakte dum pluraj jaroj gvidis la ĉinan movadon. En 1928 li vojaĝis al Eŭropo kaj ekstudis internacian juron en Parizo. Li ĉeestis la Universalajn Kongresojn en Antverpeno (1928) kaj Budapeŝto (1929) kaj la SAT-Kongreson en Londono (1930). Revenvoje al Ŝanhajo, Hu pasigis semajnon en Moskvo, dum kiu lin prizorgis sovetaj esperantistoj. En aŭgusto 1931 li aperigis la libron *Impresoj pri Moskvo,* kiu tiris la atenton de multaj ĉinaj intelektuloj al Esperanto.

La profesia kariero de Hu estis impona. Ankoraŭ kiel junulo, li iĝis ĉefredaktoro de *Orienta revuo,* unu el la plej famaj kaj longvivaj periodaĵoj de Ĉinio. De 1937 ĝis 1940 li laboris sub Guo Moruo en la kontraŭjapana propaganda servo. Poste li restadis en Singapuro, kie li estis ĉefredaktoro de grava ĉinlingva ĵurnalo. Post la starigo de Ĉina Popola Respubliko en



oktobro 1949, Hu okupis gvidajn funkciojn en la socia kaj kultura vivo de la lando. Li estis interalie estro de la Eldona Administracio, vicministro pri kulturo, vicprezidanto de Komitato por Skriblingva Reformo kaj deputito (fine, vicprezidanto de la konstanta komitato) de Tutlanda Popola Kongreso.

Ne malpli okulfrapa estis la kontribuo de Hu al Esperanto. En la tridekaj jaroj li finance subtenis la ŝanhajan Esperanto-organon *La movado*. Sed plej multe li povis helpi la movadon de post 1949. Dank' al lia influo, jam en majo 1950 povis ekaperi la revuo *El popola Ĉinio*, kaj estis ankaŭ la merito de Hu, ke Fremdlingva Eldonejo regule, eĉ dum la t.n. Kultura Revolucio, kiu malfavoris la disvastigon de Esperanto en Ĉinio, publikigis parte tre valorajn librojn en Esperanto.

Hu estis prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo ekde ĝia fondiĝo en marto 1951 ĝis sia morto. En 1984 Hu estis elektita membro de Honora Patrona Komitato de UEA. Li ne ĝisvivis la Universalan Kongreson en Pekino, kies okazigon li sendube konsideris krono de la pli ol 60-jara klopodado batalakiri por Esperanto agnoskitan lokon en Ĉinio.

Ulrich Lins

FAKA AGADO

AIS ekfunkcias

La dua Sanmarina Universitata Sesio (SUS) altiris pli ol 80 partoprenantojn al la mediteranea ŝtato, kiu per sia parlamenta leĝo de la 31a de oktobro (vd. *Esperanto*,p.205/85) oficialigas la atestilojn de SUS. Pro tio 34 kandidatiĝoj (du por la diploma, 20 por la laŭreata, kvar por la specialiĝa kaj ok por doktoriĝa niveloj) estis ekzamenitaj.

Aldone al la naŭ kvar-sesiaj kursoj (donitaj de d-roj Frank, Mužić, Szerdahelyi, Pennachietti, Broczkó, Szabó, Sellin, Ferretti kaj Alonso Nuñez), kompletigis la programon du lingvokursoj kaj trideko da prelegoj, preskaŭ ĉiuj en Esperanto. Paralele okazis publika itallingva prelegserio, vaste afiŝita tra la urbo kaj vilaĝoj de San-Marino

Tiuj afiŝoj estas nur eta spuro pri la grado de oficialigo atingita de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), kiu organizas la sesion. La eduka ministerio de San-Marino disponigis oficejan spacon, ilaron, kunlaboron kaj la ejon mem (kvin preleg-ĉambrojn en la sanmarina liceo/gimnazio).

Elektiĝis la Senato de AIS, kiu konsistos dum la sekvontaj kvar jaroj el la profesoroj Chen Yuan (Ĉinio), Paul Neergaard (Danlando), Vladimir Mužić, Oton Pancer, Božidar Popović (Jugoslavio), Fabrizio Pennacchietti (Italio), Stojan Ĝuĝev (Bulgario) kaj Helmar Frank (FR Germanio), kiu ĝin prezidos. Krome estis elektitaj la unuaj kvar dekanoj: Mužić por la kibernetika, Pennacchietti por la socikaj kulturscienca, Popović por la strukturscienca kaj Neergaard por la naturscienca sekcioj.

Preskaŭ duono el la partoprenantoj estis la profesoroj kaj docentoj, kiuj kontribuis al la programo, venantaj el landoj foraj ĝis Argentino kaj Ĉinio. Preskaŭ plia duono konsistis el ekstermovadaj germanaj studentoj, kiuj trapasis en Paderborn aŭ Düsseldorf intensan kurson de Esperanto kaj venis por internacie agnoskigi siajn diplomojn, jam akiritajn ĉe iuj usonaj, belgaj, germanaj kaj ĉina universitatoj. Tiun agnoskon ili povis ricevi per partopreno en mini-

mume unu kurso de SUS kaj per prezento kaj sukcesa defendo de Esperanta resumo de siaj disertacioj.

Bedaŭrinde, apenaŭ ĉeestis neprelegantaj esperantistoj. Ŝajnas pli facile arigi el nia movado profesoraron por gvidi kursojn ol publikon por partopreni ilin.

Tio espereble sanĝiĝos en la 3a SUS (31 aŭg.-09 sept.) kaj la 4a (ekde la 27a dec.), por kiuj oni jam akceptas prelegproponojn kaj kandidatiĝojn.

smg

LOKA AGADO

Rompi la izolitecon ĉe la periferio

La jena artikolo de Bertram Russell (Britio) skizas relative simplan manieron provi kreskigi la intereson pri Esperanto per kreskigo de la personaj kontaktoj. La grandaj diferencoj en geografio, sociaj, politikaj kaj ekonomiaj kondiĉoj postulas por similaj problemoj diversajn solvojn en diversaj landoj. Eble ĉi tiu brita ekzemplo povos helpi al grupoj en pluraj landoj evoluigi sin. Pli proksimaj kontaktoj estas kialo por uzi Esperanton, sed manko de ili tamen ofte sentiĝas inter la diversaj niveloj de la movado.

Ŝajnas, ke dum la lasta jaro enfokusiĝis du problemoj en la mondo de Esperanto: unue, la efiko de niaj informadaj penoj kaj, due, la kunplektiteco de la individuo, kiu estas ĉe la periferio de niaj aferoj.

Eble pli granda problemo estas tiu, kiu konstante ekzistas dum la tuta vivo de Esperanto, nome la sento, kiun havas la izolita individuo, kiu studas la lingvon sola kaj kiu ne havas okazon renkonti aliajn esperantistojn sufiĉe ofte por akiri aŭdan kaj parolan fluecon. Tia individuo povas baldaŭ perdi la entuziasmon.

Eble la radikoj de tiu problemo kuŝas en la fakto, ke unuopulo sentas, ke li aŭ ŝi estas tro for de la centro kaj ke la centro mem estas tro for de la esperantisto ĉe la periferio. Ofte, individuo povas aliĝi al grupo, en kiu li aŭ ŝi progresas pli kontentige. Sed tiam kreskas nova problemo: la malgranda grupo sentas sin mem izolita. Kompreneble, estas multaj landaj kaj regionaj asocioj, sed geografie ĉi tiuj ofte estas tro malproksimaj.

En tia cirkonstanco eble helpas starigi "asocion", kiu estas malpli granda ol regiona asocio, sed samtempe pli granda ol urba grupo. Tiu ideo venis al mi, kaj post kelkaj monatoj, per la kunlaboro de nia malgranda urba grupo, ni starigis tian novan asocion, kiu servas en geografia areo de proksimume cent kvadrataj kilometroj, en kiu troviĝas kvar urboj kaj kvin urbetoj. La nova asocio aranĝis malgrandan ekspozicion en unu el la urboj, kiun sekvis prelego pri Esperanto. Tuj poste stariĝis nova grupo kun ok lernantoj. Rezulte el tio ni nun havas du urbajn grupojn en nia malgranda asocia areo. Ni esperas baldaŭ aranĝi plian ekspozicion kaj prelegon en alia urbo.

En la areo de la asocio ni potenciale povus havi ĝis kvar urbajn grupojn, eble eĉ pliajn grupetojn en kelkaj el la urbetoj. Ĉiu grupo povos aliĝi al la asocio, kaj la asocio aliĝas al la regiona federacio de Esperanto-kluboj, kiu kompreneble jam havas rilatojn kun la landa asocio. Tiam, eble, la interkontakto faciliĝos kaj la intereso de la anoj samtempe fortiĝos.

La paŝoj, kiujn oni devas entrepreni, estas produkti simplan ekspozicion kaj trovi por ĝi taŭgan

Parto de ekspozicio aranĝita de Marborda kaj Ousevala Esperanto-Asocio en Seaford (Britio).

lokon. Baldaŭ post la montrado oni aranĝu prelegon. Por ke la intencita nova grupo stariĝu, la nomoj de interesitoj devas esti kolektitaj dum la ekspozicio kaj post prelego.

Kiu instruos la novan grupon da studantoj? Respondo al tiu problemo devas unue esti solvita. Unu el la membroj de nia unua grupo progresis tre rapide kaj kapablis "konduki" la membrojn de nia nova grupo. Ne ekzistas sufiĉe da instruistoj, kaj tial Esperanto, por kapti la intereson, devas akcepti tiun fakton kaj provi kuraĝigi grupojn da memlernantoj, kiujn helpas gvidanto. [Red. Estas notinde, ke tio estas eĉ principo de la Zagreba Instrumetodo. Vd. *Esperanto,* p.9/86.] La koncepton de regulaj kunvenoj de tiaj gvidantoj en la area asocio ni nun esploras. Ni nun studas detale la starigon kaj funkcion de "memlernaj grupoj". Ni firme kredas, ke tiudirekte kuŝas ebleco por rapide akcepti kaj kreskigi la uzadon de Esperanto. Ni bonvenigas opiniojn pri tio. (Adreso: Marborda kaj *Ouse*-vala Esperanto-Asocio, p/a B. Russell, 103 South Coast Road, Peacehaven, E. Sussex, BN9 8QU, Britio.)

La informado estas daŭre atentenda. En la urboj de multaj landoj troviĝas plej diversaj organizoj, kiuj

bonvenigas prelegojn. Oni eventuale pretigu liston de personoj ne nur pretaj, sed ankaŭ preparitaj por prelegi.

Esperanto ne povas atingi la progreson, kiun ĝi meritas sur la loka nivelo, se unuopuloj kaj grupoj sentas sin ĉe la periferio. Aliflanke, la unuopulo ne rajtas supozi, ke la tuta laboro okazu en la "centro". Fakte, la karaktero de la filozofio malantaŭ la Internacia Lingvo preskaŭ postulas, ke la individuo estu la plej grava ĉenero en la informado. Tamen, la "centroj" devas konstante agi por kunligi tiujn unuopulojn. Tiu, kiu iam respondecis en la administrado de granda organizo, scias, ke ekzistas danĝero, ke la "administrantoj" iĝas elito, kiu perdas la veran kontakton kaj "senton" kun la ordinaraj membroj. La plej sukcesa organizo sendube estas tiu, kiu funkcias kun proksimaj rilatoj inter siaj diversaj partoj. Mia opinie, la "centroj" de la Esperanto-movado devas serĉi novajn metodojn por helpi la unuopulojn kaj grupojn. Egale grave estas, ke la unuopulo ludu sian rolon, subtenante siajn grupon, landan asocion kaj, sendube, sian internacian organizon.

Bertram Russell



Vizitas la 20an Esperanto-Ekspozicion de Takatuki la urbestro, s-ro Emura Tosio (meze). Malsupre: La ekspozicio prezentis multajn Esperantajn librojn.

berg, prezidanto de Esperanto-Societo de Oulu (Finnlando), kiu partoprenis la agadon lige al la jubilea ekspozicio. La Esperanto-societoj de Takatuki kaj Oulu havas kunlaboran kontrakton.

Takeuti Yosikazu

20a ekspozicio

La unua Esperanto-ekspozicio en Takatuki (350 mil loĝantoj), Japanio, okazis en 1965. Ekde tiu jaro oni ĉiujare organizas ekspozicion en Urbana Domo, tiel ke tiu en novembro estis jam la dudeka. La ekspozicio jam estas tradicia evento de la urbo.

Ankaŭ pasintjare la ekspozicio partoprenis en la Kultura Festivalo de la urbo, per kio ĝi ricevis oficialan apogon kaj materiale kaj morale. Krom la urbestro vizitis la ekspozicion ankaŭ la eduka komisiono, magistratanoj kaj lokaj raportistoj.

La ĉi-foja ĉeftemo estis interpopola amikiĝo per Esperanto, prezentita per paneloj, libroj, gazetoj, sonbendoj ks. Notinda estis la vizito de Erik Lind-

REAGOJ

"Nepermeseblaj eldiroj"

Mi tre ĝojis lernante pri la nova rezolucio de Unesko favore al nia lingvo, sed kun miro kaj ĉagreno mi legis la enkondukan artikolon de s-ro Simo Milojević en la decembra numero de *Esperanto*. Mi ne komprenas kiel alta funkciulo en la oficiala organo de laŭstatute neŭtrala asocio permesas al si ataki kaj moki la politikon de du antaŭaj kaj multaj nunaj ŝtatoj-membroj de Unesko.

S-ro Milojević ja devus scii, ke ne nur Usono kaj Britio, sed multaj aliaj landoj – kaj ankaŭ altaj oficistoj en aliaj internaciaj organizaĵoj – sentas profundan maltrankvilon pro la lastatempa evoluo de Unesko, la kritikinda administrado de ĝiaj financoj kaj ĝiaj ekscesoj ligitaj i.a. al la tiel nomata Nova Monda Ordo de Informado kaj Komunikado. Inter tiuj landoj troviĝas mia propra, Danlando, sed eble s-ro Milojević konsideras ankaŭ Danlandon imperiema malamiko de Unesko. La dana registaro serioze konsideras ĉiujn eblecojn plibonigi aŭ influi la funkcion de la sekretariato, inkluzive la gravan paŝon forlasi Uneskon. Se Danlando estus forlasinta la organizaĵon, ĉu la dana registaro tiuokaze estus vasale sekvinta Usonon, tiel demonstrante ke ĝi ne estus kapabla senpere kaj honeste taksi aron da politikaj faktoj kaj evoluoj kaj memstare tiri la deziratajn konsekvencojn?

Mi esperas, ke estas la lasta fojo, ke tia artikolo aperas en *Esperanto* kaj la lasta fojo, ke tiaj nepermeseblaj eldiroj, kontraŭaj al la Statuto mem de UEA, estas dissemitaj en kaj per nia Asocio.

Eskil Svane (Francio)

"Decus esti singarda"

Ricevinte la decembran numeron de *Esperanto*, mi unue tuj rapidis gratuli pro la grava atingo ĉe Unesko kaj pro la brila laboro, kiun Tibor Sekelj faris. Mi vidas, per la artikoloj, ke li i.a. substrekis la neŭtralecon de Esperanto kaj de UEA, kaj mi supozas, ke la fakto de la neŭtraleco estis inter la kvalifikoj, kiuj gvidis al la bona rezulto.

Des pli mi akre reagis kontraŭ la grava ekzemplo de neneŭtraleco, kiun ni trovas en la sama numero de la revuo. Temas pri la artikolo de Simo Milojević [en kiu li] deklaras la politikon de Usono neakceptebla. Ĉar Usono mem donis klarajn esprimojn, ke ĝia sinteno estas politika, ankaŭ la sinteno de Milojević – kaj per li la oficiala vizaĝo de UEA – estas politika, subtenante unu el la frakcioj de la monda politiko.

Al tio s-ro Milojević aldonas klaran ofendon al Britujo, nomante la politikon de tiu lando "vasala" kaj per tio esprimante, ke Britujo mem ne kapablas fari politikajn decidojn.

Mi ne scias el kiu lando s-ro Milojević venas, sed la nomformo indikas al orienta Eŭropo. Por legantoj de lia artikolo tio facile kreas la konkludon, ke li – kaj pli grave, ke UEA – subtenas la politikan sistemon de la landoj de orienta Eŭropo. Jam longe tiu akuzo pendis super UEA, tial decus, ke UEA estu tiel singarda, ke eldiroj kiel tiuj de s-ro Milojević ne aperu en gvidartikolo de la revuo.

Hans Amund Rosbach (Norvegio)

"Mi gratulas"

Malofte mi kapablas finlegi la ĉefartikolon de la revuo *Esperanto* kun fervoro. La artikolo verkita de Simo Milojević en decembro estas escepto. Mi gratulas.

Vere la lingva problemo ne estas malpli grava ol la nunaj mondaj problemoj de paco, malprogreso kaj malsato. Unesko devas esti subtenata de ni ĉiuj, aparte kiam Usono kaj [aliaj] forlasas ĝin. Persone mi scias, ke Unesko estis, kaj eble ankoraŭ estas, nesto de spionado kontraŭ la tria mondo. Ĉiuj esploroj, studoj kaj projektoj de Unesko kaj ĝiaj organizaĵoj estis, kaj eble ankoraŭ estas, je la dispono de tiuj potenculoj. Kompreneble, ili uzas siajn kaŝitajn kontaktojn por akiri tiujn trezorojn, kiujn sendube ili utiligas ne por la pacaj celoj de Unesko, sed por siaj propraj egoismaj interesoj. Ekzemple, Unesko kuraĝigis grandegan projekton establi fabrikon de vegetaĵa oleo en iu mez-orienta lando, kiu tute ne uzas enlandajn materialojn por produktado, tamen importas 80% de la krudmaterialoj... La "spertuloj" de Unesko, kiuj laboras tie (persone mi konas kvar el ili, arabojn kaj nearabojn) fakte okupiĝas pri politikaj spionaj aktivadoj.

Mi... prezentas miajn bondezirojn al UEA kaj ĝiaj oficialaj celoj en servo al paco.

Hussain Mohammed Al-Amily (Francio)

La redaktoro ja dubis kaj kun iom pli da tempo je sia dispono verŝajne estus foriginta almenaŭ la vorton "vasale". Ke estas malfacile esti perfekte neŭtrala, atestas ankaŭ pluraj frazoj de s-ro Svane.

Subskribita artikolo ĝenerale prezentas opiniojn de la verkinto, kiuj kompreneble ne nepre konformas al tiuj de UEA. Tiom, kiom pravas la kritiko, la redaktoro kompreneble akceptas tion sur sian kapon.

La afero levas valoran kaj malfacile respondeblan demandon. La 23a Ĝenerala Konferenco de Unesko (kune kun la partopreno de Britio kaj observantoj de Usono) faris al la Esperanto-movado historian rekonon. Kiel oni jam diris, tio okazis ĉar ankaŭ Unesko en iu senco komencis kompreni la pravecon de pluraj el niaj vidpunktoj. Kiom pravas la lastatempa kritiko kontraŭ Unesko, respondu la informita leganto mem, sed ke ne ĉio malbonas en Unesko, atestas ĝia ĵusa rezolucio.

La problemoj de la mondo ofte estas ege komplikaj, i.a. ankaŭ la monda lingvo-problemo, kaj pro iu aŭ alia malbona eco oni tro ofte emas "elĵeti la bebon kun la ban-akvo". Pro la konsultaj rilatoj de UEA kun Unesko, la Esperanto-movado ne propravole troviĝas en malfacila pozicio inter la diversopiniaj politikantoj, kie neeviteble falas iom da koto sur la Asocion. Sed tiel longe kiel Unesko restas grava internacia organizaĵo, kiu helpas al Esperanto, same neeviteble esperantistoj emas amiki kun ĝi. Bonvolu noti, ke la sola efika maniero malpravigi tiun amikemon estas konvinki la kontraŭulojn de la nuna Unesko almenaŭ samgrade subteni la Internacian Lingvon.

Simo Milojević, la ĝenerala direktoro de UEA, estas jugoslavo; Geoffrey Sutton, la redaktoro de ĉi tiu revuo, estas brito.

Geoffrey Sutton

Granda loka prestiĝo

La Esperanto-grupo de Aalen ŝuldas grandan dankon pro la publikigo pri la urboprospekto en la maja numero de *Esperanto*.

Centoj da prospekto-petoj atingis la urbodomon kaj kaŭzis miron pri la mondvasta Esperanto-movado. Fakte el ĉiuj anguloj de la mondo homoj interesiĝis pri la urbo Aalen. Ni, la lokaj esperantistoj, nun ĝuas grandan prestiĝon ĉe la urbaj respondeculoj. Ankaŭ la urbestro nun tre favoras nian agadon. La aliaj fremdlingvaj prospektoj en la angla kaj franca kuŝas en la urbodomo, kaj preskaŭ neniu petas ilin.

Intertempe aperis la dua eldono de la Esperanta prospekto... [vidu sub *Loke: FR Germanio*].

Siegfried Schlumberger (FR Germanio)

ANTAŬ LA 71a UK

La misteroj de la ĉina skribo

Baldaŭ la Universala Kongreso okazos en Pekino. Alvenos kongresanoj el Eŭropo, Ameriko, Azio... Certe ili havos, pli ol en sia lando, multajn okazojn vidi ĉinajn skribaĵojn, kaj – krom se ili havas apartajn sciojn pri tio – eble ili demandos: "Kiel oni povas retrovi sin en tiel malsimpla skribsistemo? Kial oni ne skribas tiun lingvon per simpla alfabeto, kiel oni faras en Eŭropo-Ameriko?"

Fakte, la afero estas iom pli simpla, ol oni ĝenerale kredas. Unue oni precizigu, ke la ĉina lingvo estas unusilaba. Tio ne signifas, ke ekzistas nur unusilabaj vortoj, tute ne (la vere unusilabaj vortoj reprezentas malpli ol 50% de la nuntempa ĉina leksiko, sed repre-

Foto: Unesko/M. Claude



Ĉina mekanika tajpilo postulas elekti ideogramojn el aro da skatoloj, kvankam nuntempaj komputotajpiloj skribas la ĉinan same facile kiel Esperanton.

zentis pli multe en la antikveco). Tio signifas nur ke en la plursilabaj vortoj, ĉiu silabo aparte havas memstaran signifon, kio ne okazas en Esperanto aŭ en la hindeŭropaj lingvoj. Ekzemple, "Ĉinio" estas la dusilaba vorto *Zhōngguó*, en kiu *zhōng* estas "mezo, centro" kaj *guó* estas "lando": lando en la mezo. "Pekino" estas *Běijīng*, kun *běi* (Nordo) kaj *jīng* (ĉefurbo): norda ĉefurbo. Efektive, Pekino estas la norda ĉefurbo, kontraste al Nankino, la suda ĉefurbo.

Ĉinio: 中国 (zhōng guó) Pekino: 北京 (běi jīng)

Unu silabo estas do ĉiam unu signo; inverse unu signo estas ĉiam unu silabo. Simple, ĉu ne? Kaj la vortoj-silaboj neniam ŝanĝiĝas (ne ekzistas konjugacio, deklinacio ktp). Tio estas ege pli simpla ol en la hindeŭropaj lingvoj.

Ĉina formo de la vorto «Esperanto»:
世界語 shìjièyǔ (shìjiè = tutmondo, yǔ = lingvo)
(shì = mondo, jiè = sfero)

Nun, antaŭ ol paroli pri la ideogramoj mem, necesas diri kelkajn vortojn pri la maniero transskribi la ĉinajn vortojn per latinaj literoj. En la pasinteco, la francoj transskribis la ĉinajn vortojn laŭ la franca fonetiko, kio estas logika; sed evidente la angloj transskribis laŭ la angla ktp. Rezultis, ke la ĉi-supra vorto *zhōngguó* estas en Francio "tchongkouo", en Britio "chongkuo", en germanlingvaj landoj "dschongguo"; la sama homo nomata en Francio "Tchiang Kaï-chek" estis skribita en Britio "Chang Kai-shek", kaj en germanlingvaj landoj "Tschiang Kai-schek". Ĉiu lando havis do sian propran sistemon, eĉ ofte plurajn, ĉar ĉiu aŭtoro de vortaro inventis la sian. Terura kaoso!

Plie, apartaĵo de la ĉina (mandarena) lingvo, kaj de kelkaj aliaj, estas ke ĉiu silabo estas prononcata laŭ unu el kvar tonoj. Eta desegno komprenigos la aferon pli bone ol longa priskribo:



(Oni vidas, ke simpla eraro de tono povas facile igi frazon tute sensenca aŭ alisenca.) Kaj kompreneble ĉiu sistemo havis sian propran manieron por indiki la tonon.

Por meti ordon en tiun kaoson, nova sistemo estis farita en Ĉinio mem, la sistemo "pin-yin", oficialigita en februaro 1958, post ok jaroj da serĉoj de la Komitato por la Reformo de la Ĉina Skribo. Granda avantaĝo de tiu sistemo estas, ke ĝi estas nek angla, nek

franca ktp., sed ĉina. Nuntempe ĝi estas preskaŭ la sola internacie uzata, tamen ofte sen indiko de la tono: Deng Xiaoping (kun la tonindikoj: Dèng Xiǎopíng), Mao Zedong (Máo Zédōng) ktp. Ĝi ne celas anstataŭigi la belajn ideogramojn, sed helpi al la eksterlandanoj, kiuj lernas la ĉinan lingvon, kaj ankaŭ al la ĉinoj, por indiki eventuale la prononcon de la ideogramoj.

La ĉina fonetiko ebligas la ekziston de proksimume 400 silaboj. Ĉar ĉiu el ili, kiel ni jam diris, povas esti prononcata laŭ kvar tonoj, oni finvenas al 1 600 malsamaj ĉinaj silaboj, almenaŭ teorie (praktike la ĉinaj silaboj estas proksimume 1 250, ne pli). Tio ne estas multa (por komparo: *Plena ilustrita vortaro* entenas iom pli ol 15 200 vortojn). Rezultas grandega nombro da homonimoj (samsonaj vortoj): Se mi skribas latinlitere "gōng" (kun tamen indiko de la unua tono), neniu ĉino povas scii al kio mi aludas. Por kompreni pri kio temas, oni bezonas, aŭ detalan kuntekston, aŭ pli simple la ĉinan ideogramon. Oni juĝu:

工 gōng = laboro	功 gōng = merito	攻 gōng = atakt
弓 gōng = arko	公 gōng = publika	供 gōng = oferi
恭 gōng = ĝentila	宮 gōng = palaco	肱 gōng = brako

Naŭ homonimoj por "gōng"! Kaj por "shì" mi trovis 19! Sed fakte, la homonimoj estas tiaj nur por la orelo aŭ en latinlitera transskribo. Por la okuloj, homonimoj ne ekzistas. Teksto povus esti centprocente nekomprenebla, se ĝi estas nur parolata, aŭ skribita per iu ajn latinlitera sistemo; sed skribita per la normala ĉina skribo, ĝi tuj iĝas perfekte klara! Ĉi tie estas la miraklo de la ideogramoj: ili estas, pli ol la alfabetoj, skribo por la okuloj.

Sed oni pensos, ke estas tre malfacile memori milojn kaj milojn da signoj, konsistantaj el strekoj laŭ formo tute arbitra. Tio estas sendube superhoma laboro? Ĝuste ne! La ideogramoj ne estas arbitraj. Per si mem, ili havas sencon. Laŭ sia konsisto, ili dispartiĝas en tri ĉefajn kategoriojn:

1) La **morfogramoj**, desegnoj kiuj reprezentas (aŭ almenaŭ reprezentis) objekton. Ofte tamen la formo tiel ŝanĝiĝis, ke estas nun tre malfacile rekoni la originan objekton. Sed feliĉe oni trovis ekzemplerojn de ĉinaj skribaĵoj, datiĝantajn de la unua (eĉ de la dua) jarmilo a.K., kaj tio ebligas komparojn kun la nunaj formoj. Jen ekzemploj:

= suno ; antikve : = okulo ; antikve :

= monto ; antikve : = tero ; antikve :

En la saman kategorion, oni povas meti la signon *zhōng* (ĉi-supre), signifantan "centro, mezo": streko trairas rektangulon tra la *centro*.

2) La **morfo-fonogramoj**, en kiuj unu parto reprezentas objekton, kiel en la morfogramoj, kaj alia parto elvokas proksimuman sonon. Ili reprezentas pli ol 90% de la ĉina leksiko. Jen unu ekzemplo:

mǎ = ĉevalo (desegno de ĉevalo kun kvar piedoj)

nǚ = virino (rita sinteno de la ĉinaj knabinoj, kun brakoj krucigitaj sur la ventro)

mā = patrino (virino + ĉevalo)

Ĉevalo kaj virino estas (tute relative!) desegneblaj. Sed kiel desegni patrinon (ĉine: *mā*)? Patrino estas esence virino, do oni unue desegnis virinon. Sed la sono *mā* estas proksima al *mǎ* (ĉevalo); inter ambaŭ, estas diferenco nur de tono. Do al desegno de virino, kiu elvokas sencon, oni aldonis desegnon de ĉevalo, kiu elvokas prononcon (nur elvokas, ne indikas precize). Jen la klarigo de la ĉi-supra ideogramo por "patrino". Laŭ la sama sistemo, "formiko" estas *mǎ* (homonimo de la ĉevalo): ĝia ideogramo kunigas desegnon de insekto, por la senco, kaj desegnon de ĉevalo, por la prononco. Jen pliaj ekzemploj:

門 mén (tuŝi) = la mano 扌 ĉar oni tuŝas per mano, kaj duklapa pordo 門 ĉar ankaŭ pordo estas prononcata «mén».

洋 yáng (oceano) = la akvo 氵 ĉar oceano estas akvo, kaj la ŝafo 羊 ĉar ankaŭ ŝafo estas prononcata «yáng».

3) La **logikaj kunmetaĵoj**. Ĉi tiu kategorio estas malpli grava, sed plej bone montras la genion kaj inventemon de la aŭtoroj de la skribo. Kiel reprezenti "Oriento"? Nu, imagu ke, frumatene, en la komenco de bela somera tago, vi promenas en arbaro. Vi rigardas al Oriento. Kion vi vidas? La Sunon, kiu ĵus leviĝis kaj estas videbla tra la folioj de arbo. Nu, la ideogramo de "Oriento" reprezentas ĝuste sunon viditan meze de arbo.

東 dōng (Oriento) = suno 日 vidita tra branĉoj de arbo 木

杳 yǎo (mallumo) = suno pli malalta ol la arboj

Evidente, estas ĉi tie granda arbitro: simila rezonado kondukus al la signifo "Okcidento" se la sceno okazus vespere. Ekzistas rilato inter la signo kaj la signifo, jes, sed ne deviga kaj konstanta rilato. Spite de tiu arbitro, ĉino kiu renkontas nekonatan signon, serĉas diveni ties sencon, kaj plej ofte li sukcesas.

Vidu ĉi-supre la signon por "Nordo" (*běi*): ĝi reprezentas du homojn dorson ĉe dorso. Kial? Ĉar antikve, dum la ritaj ceremonioj, oni devis rigardi al la Sudo; sekve, la Nordo estis esence la punkto, al kiu

oni montris la dorson. La ideogramo (*jiān*), konsistanta el du desegnoj de virinoj, signifas "kverelo, reciprokaj akuzoj", ĉar, diras la antikvaj glosoj, "du virinoj ne povas akordiĝi". Nefeminisma estas ankaŭ la signo *qī*, kiu signifas "edzino", kaj reprezentas virinon, kiu tenas balailon. Cu kelkaj aliaj ekzemploj estos bonvenaj?



Tiuj klarigoj ne estas fantazia inventaĵo: atestas ilin tre antikvaj tekstoj.

Oni ne povas nei, ke tiu sistemo estas tamen malpli simpla ol la 28 literoj de la Esperanta alfabeto. Sed ĉu vi ne trovas ĝin ege pli riĉa je poezio? Ni konsideru ankaŭ ke en Ĉinio ekzistas multaj dialektoj, inter kiuj la interkompreno estas plej ofte malfacila aŭ eĉ neebla. Neebla parole, sed facila skribe, dank' al tiuj signoj.

Antaŭ jarcentoj, la ĉina skribo multe disvastiĝis ekster Ĉinio. Nuntempe, la japana lingvo, kiu antikve ne havis propran skribon, uzas skribon konsistantan el kunmetaĵo de ĉinaj ideogramoj kaj du aliaj sistemoj. Ankaŭ la korea lingvo uzas la ĉinajn ideogramojn, kune kun koreaj literoj nomitaj hanguloj, inventitaj en 1446.

Kaj dank' al tiu mirinda sistemo, japano aŭ koreo, kiu ne scias eĉ unu ĉinan vorton, povas, nur vidante ĉinan tekston, kompreni ĝin, almenaŭ grandparte.

La ideogramo estas la sama en tiuj tri neparencaj lingvoj, kvankam la legado estas tute alia. En la eŭropaj lingvoj, kvankam la legado estas tute alia. En la eŭropaj lingvoj, nur la ciferoj estas iel ideogramoj.

André Cherpillod

Kongresa Komuniko

71a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Pekino (Ĉinio)

26 julio – 2 aŭgusto 1986

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK: p/a Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, Beijing, PR Ĉinio.

Dua Bulteno: Ĝi aperos fine de februaro kaj tuj ekspediĝos al ĉiuj aliĝintoj. Tamen ni ĉi tie jam nun koncize resumas la ĉefajn informojn pri la loĝado kaj ekskursoj.

Loĝado: Por loĝi en hotelo oni devas preni la t.n. turisman pakaĵon, kiu inkluzivas tranoktadon, tri manĝojn tage, la enurbajn transportojn, tuttagan ekskurson, du duontagajn ekskursojn (B1 kaj B2, vd. sube), ĉiĉeronadon en Esperanto kaj peton pri vizo. La prezoj por unu persono por la tempo ekde la 25a de julio ĝis la tagmezo de la 3a de aŭgusto (t.e. por 9 tagoj) estas: unuaklasa hotelo (dulita ĉambro) 2 340 gld.; mezklasa (dulita ĉ.) 1 435 gld kun banejo, 1 315 gld kun duŝejo; mezklasa (trilita ĉ.) 1 060 gld.

Loĝado en la amasloĝejo dum la sama tempo kiel supre kostas 360 gld., kio inkluzivas lokon en kvarlita ĉambro, matenmanĝon, la tuttagan ekskurson kun tagmanĝo, tag- kaj vespermanĝon en la inaŭgura tago kaj peton pri vizo. Ni atentigas, ke la amasloĝejo estas por kongresanoj el landoj kun pagaj problemoj kaj por gejunuloj.

Dumkongresaj ekskursoj: Kaj la turisma pakaĵo kaj la prezo por la amasloĝejo inkluzivas tuttagan ekskurson al la Granda Muro. La turisma pakaĵo enhavas ankaŭ du duontagajn ekskursojn: B1 al la Somera Palaco kaj B2 al la Imperiestra Palaco. Por amasloĝejanoj B1 kaj B2 estas aparte mendeblaj, dum la ekskursoj B3 (Ĉiela Altaro) kaj B4 (Lamaisma Templo kaj Jingshan-parko) estas por ĉiuj nur aparte mendeblaj. Ĉiuj duontagaj ekskursoj kostas po 48,50 gld.

Antaŭkongresaj ekskursoj: Okazos tri antaŭkongresaj ekskursoj. La vojaĝplano de AE1 (2 295 gld) estas Kantono - Wuhan - Jangzi - rivero-Chonqing - Chengdu - Pekino. Ĝi komenciĝos la 12an de julio kaj daŭros 14 tagojn, kun plurtaga ŝipvojaĝo laŭ Jangzi. Por tiuj, kiuj volas vidi la t.n. tegmenton de la mondo – Tibeton, estas la ekskurso AE2 (2 415 gld). Ĝi komenciĝos la 15an de julio en Kunming kaj daŭros 11 tagojn. La vojaĝplano estos Kunming-Chengdu-Lasao-Chengdu-Pekino. I.a. la komencloko de la Silka Vojo, Xi'an, estos vizitata (ekde la 19a de julio) dum la 7-taga ekskurso AE3 Pekino-Xi'an-Nankino-Yangzhou-Nankino-Pekino (1 575 gld).

Postkongresaj ekskursoj: Eblas elekti inter ses ekskursoj post la Kongreso. Ili ĉiuj komenciĝos en Pekino la 3an de aŭgusto. Por tiuj, kiuj ne disponos estas por kongresanoj el landoj kun pagaj problemoj kaj por gejunuloj.

pri multa tempo, estos PE1 (855 gld): Pekino-Hangzhou-Shaoxing-Hangzhou-Honkongo; kaj PE6 (375 gld): Pekino-Chende-Pekino. Ambaŭ finiĝos la 6an de aŭgusto.

Pekino - Nankino - Yangzhou - Nankino - Ŝanhajo - Suzhou-Ŝanhajo estos la vojaĝplano de PE2 (1 395 gld), kiu finiĝos la 9an de aŭgusto. Se kredi, ke en Guilin troviĝas la plej bela pejzaĝo de la lando, tiam oni aliĝu al la ekskurso PE3 (1 565 gld), kies veturplano estos Pekino-Guilin-Hangzhou-Shaoxing-Hangzhou-Pekino. La ekskurso finiĝos la 9an de aŭgusto en Pekino. Nordorienten iros PE4 (1 195 gld), dum kiu oni vizitos Dalian, Shengyang kaj Harbin. Ĝi finiĝos en Pekino la 10an de aŭgusto. Ŝipvojaĝon laŭ Jangzi eblos ĝui ankaŭ post la UK, se oni elektos la ekskurson PE5 (1 910 gld). Dum ĝi oni vizitos la urbojn Wuhan, Chonqing kaj Kantono, de kie oni iros trajne al Honkongo la 15an de aŭgusto.

Flugvojaĝoj: Kiel promesite, UEA aranĝos tutan aron da flugoj, memstare el Eŭropo, kunlabore kun JEI el Japanio kaj kun ELNA el Usono. Ĉar la flugtarifan mondon regas tute specifaj leĝoj, kiuj fontas el la stato en la loka merkato kaj el specialaj kurzoj preskribataj de IATA, la ĉi-sekvaj prezoj kelkloke surprizos vin. Ir-reira bileto ĝis Pekino kaj reen kostos jene: el Amsterdamo 3 318 gld; el Londono 2 600 gld (675 pundojn); el Parizo 3 250 gld. (FF 8 715); el San-Francisko 3 500 gld. ($ 1 311); el Tokio 2 845 gld. (200 400 enojn). Estas granda verŝajno, ke ni en la Dua Bulteno, kie vi trovos la detalojn pri la flugoj, povos lastmomente proponi flugon el unu-du aliaj mezeŭropaj urboj kun unu el la prezoj sub 2 000 gld. Ĉiuj ĉi prezoj rilatas nur al nuda flugo al kaj el Pekino.

Filatelo: Anstataŭ poŝtmarkon, la Ĉina Poŝto emisios okaze de la UK filatelan tutaĵon, t.e. specialan porokazan koverton kun surpresita poŝtmarko. Ĝi estos lanĉita kaj aĉetebla en la UK mem. La Libroservo de UEA planas mendi kvanton por interesitaj nekongresanoj. Krome, estas pretigata en Ĉinio kolora katalogo de Esperanto-temaj poŝtmarkoj.

Libroservo: La kongresan libroservon prizorgos la Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio (Guoji Shudian). Ĝi tamen disponos pri limigita buĝeto por importi neĉinajn Esperanto-librojn. Tial UEA konsentis senpage peri la akiron kaj transporton de tiuj libroj. Eldonejoj estas petataj konsideri eblecojn doni maksimuman specialan rabaton por ebligi al centoj da ĉinaj kongresanoj aĉeti Esperantajn verkojn. Tre bonvenus ankaŭ senpaga disponigo de iuj titoloj. La eldonejoj bv. sendi siajn proponojn al la konstanta adreso en Roterdamo. En Ĉinio oni intencas eldoni plurajn novajn titolojn ĝis la UK, same kiel vastan sortimenton de diversaj prikongresaj memoraĵoj.

Statistiko: Ĝis la 10a de februaro enskribiĝis 1 323 kongresanoj el 50 landoj.

Recenzoj

Posedinda antologio de frua germana literaturo

Germana antologio (ekde la plej frua epoko ĝis ĉ. 1700). El la germana trad. W. Herrmann kaj H. Rössler; red. O. Brodt. Gerlingen: Eldonejo Bleicher, 1985. 327p. Ilus. 19cm. ISBN 3 88350 503 X. Prezo: 31,50 guldenoj.

La eldonintoj de tiu ĉi antologio faris al mi persone gravan servon, ĉar mia ĝisnuna kono pri la literaturo germana estis hontinde magra. Leginte la volumon, mi jam sentas, ke oni estas tre bone informita. La traktitaj epokoj estas: la fruĝermana (antaŭ 763 p.K.), la tempo de Karolidoj kaj Otonidoj (763-1024 p.K.), la Trobadoroj (1050-1250), la Malfrua Mezepoko (1250-1400), Renesanco kaj Humanismo (1400-ĉ.1517), la Reformacio (1517-1620), la Baroko (1620-1700). Al ĉiu epoko estas antaŭmetita sufiĉa, do ne troa, klarigo pri la signifo de tiu epoko kaj pri la individuaj aŭtoroj. Entute, la skemo de la libro estas admirinde trafa.

Neordinara estas la fakto, ke la tutan pli ol 300-paĝan libron – kun escepto de tri mallongaj poemoj – tradukis nur du homoj. Al Wilhelm Herrmann ni ŝuldas la parton ĝis 1250, al Helmut Rössler la ceteron. Tiu laboro estis por ambaŭ grandega fortostreĉo, kaj mi ĝojas, ke ili tre bonkvalite plenumis ĝin. Ne scipovante la germanan lingvon, mi ne kapablas prijuĝi la ekzaktecon de la tradukoj. Sed ĝuste al nescipovantoj oni destinas tian libron, kaj mi povas atesti, ke la tradukoj legiĝas flue, klare kaj ofte eĉ kontentige sprite. Se mi suspektas, ke plurfoje oni plilongigis la uzitan verson, tio ĉiuokaze neniel ĝenas la leganton.

Kompreneble la fruaj partoj estas plejparte poeziaj, ĉar tia estis, kiel kutime, la frua literaturo. Kiam



***Du mezepokaj miniaturoj el* Germana antologio.**

komenciĝas la prozaĵoj, ili estas unue iom seninteresaj (krom al religiuloj kaj historiistoj), sed tre baldaŭ ni trovas pecojn vere atentokaptajn, ekzemple pri la sciencaj eksperimentoj de Nikolaus von Cues (1401-1464), aŭ kontraŭstaro al persekutado de judoj (Johannes Reuchlin, 1455-1522). Martin Luther estas multe pli leginda, ol mi antaŭsupozis, kaj aparte plaĉas lia "Sendletero pri la tradukado".

La versojn karakterizas agrablaj ritmoj kaj ĝenerale trafaj rimoj (vd. ekzemple "Amo-kanto", p.186, kun tre komplika rimskemo, trafe rekreita).

Aparte menciindaj estas la ilustraĵoj, per kiuj oni saĝe ornamis la volumon. Ili estas samtempaj kiel la literaturaĵoj (portretoj de la aŭtoroj, aŭ paĝoj el la originalaj verkoj), kaj forte sentigas ĝustan etoson.

La lingvaĵo en la volumo estas laŭdinde klasikeca. Tiom pli oni miras pri vortoj kiel *vehemente* (sen klarigo), *diskordo* (dis-kordo? disk-ordo? – ho, *Plena ilustrita vortaro)*, *Hiob* anstataŭ Ijob k.a. Aparte ĝena estas misuzo de la vorto *knapo*, tre ofta en precipe mezepokaj verkoj. Laŭ *PIV*, *knapo* estas sinonimo de *varleto* 2; sed en la antologio ĝi nepre sinonimas al *varleto* 1 (tre necesa termino signifanta: "mezepoka paĝio, kiu servis la nobelon por fariĝi kavaliro"), kio estas erara. Kial ne uzi la vorton *knapo* laŭ signifo de *varleto* 2, kaj rezervi la vorton varleto (sen ambiguo) por la mezepoka termino? Sed logika oni malofte estas.

Libro posedinda, almenaŭ de negermanlingvanoj.

William Auld (Skotlando)

Krimromano en bela, sed nekutima lingvaĵo

La mortosonorilo de Chamblay, Karolo Piĉ (Karel Píč, 1920). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 249p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 1 Beletro originala 4. Prezo: 51,90 gld.

Traleginte *La mortosonorilo de Chamblay* tri fojojn, mi ankoraŭ ne estas certa, ke ĝia aŭtoro volis verki nur detektivan romanon aŭ ĉu lia celo estis moki la romantikismajn kaj fantastajn romanojn plenajn de supernaturaj kaj hororaj okazaĵoj, kiuj komencis multnombre aperi en Eŭropo en la 18a jarcento.

La sonorilo de la titolo troviĝas en renesanca kastelo en fikcia eŭropa katolika lando kun telefonoj, trajnoj kaj ruĝaj tramoj, kie la plimulto de la loĝantoj, se ne la loĝlokoj, havas anglalingvajn nomojn.

Ricevinte misteran letereton, la posedanto de la kastelo, la grafo de Chamblay, malaperas, kaj unu el la sonoriloj de lia kastela kapelo subite eksonoras. Tiu sonorilo tradicie sonoras nur kiam perforte mortas ano de la grafa familio. Neniu scias, kien la grafo iris aŭ kiu sonorigis la sonorilon. Filozofa detektivo alvenas, pridemandadas la filinon kaj la geservistojn de la grafo kaj la kapelanon. Ŝi montras al li la multajn ĉambrojn de la kastelo. Li ekamas ŝin. Pro tradicio ŝi devas sola iri en la familian kripton sub la katedraleca kapelo. La mortsonorilo subite sonoras denove, kaj denove neniu scias, kiu estas la sonoriganto.

Eble pro tio, ke Karolo Piĉ projektis tradukon de sia romano en nacian lingvon, la nomo de la detektivo-heroo havas la inicialojn U.E.A. kaj lia kromnomo estas "serĝento Esperanto". Escepte de tio, Esperanto ludas nenian rolon en la intrigo de la romano ekster mencio pri raportisto de *Heroldo*.

Ĉu parodio, ĉu travestio – kaj Henri Vatré en sia pensiga antaŭparolo opinias, ke neniel temas pri plagiato aŭ pastiĉo – ĝi havas la virton esti verkita en simpla stilo per nelongaj frazoj kaj per vortoj, kiuj kun kelkaj esceptoj troviĝas inter la kovriloj de *Plena vortaro*.

Inter la esceptoj estas vortetoj kiel *ab*, *autem*, *enim*, *graŭ*, *nam*, *trunk*, *solti*, kies kompreno kaj enkapigo estas ofte malfacilaj. Eĉ Piĉ mem en siaj notoj kaj klarigoj post la romano bezonas dek kvin liniojn por klarigi *autem*, dek unu por *enim* kaj dek du por *nam*!

Pluraj latinaj frazoj kaj eĉ ĉapitra titolo estas nek tradukitaj nek klarigitaj.

Lingvaj neortodoksaĵoj estas *ĉifoje* kaj *tiuĉifoje* anstataŭ "ĉi-foje", *ĉitiea* anstataŭ la Fundamenta "ĉitiea", *sonorilado* anstataŭ "sonorado", *staturo* anstataŭ "figuro", *da* antaŭ "tiu" kaj "tio", *pli poste* anstataŭ "poste", *sublimi* anstataŭ "sublimigi". Eble surprizos leganton, ke fenestro kaj spegulo povas esti *blindaj*, ke kesto estas *ferumita*, kaj ke en luksa kastelo kaj en ĝia kapelo oni havas *stanajn* kandelingojn kaj genuas *en* benko anstataŭ "antaŭ" ĝi. Por numeraloj anstataŭ la Fundamenta sistemo de "naŭdek tri" kaj "dek-unua" oni vidas alian sistemon: *naŭdekdri* kaj *dekunua*. Estas strange, ke tiel eminenta stilisto ŝanĝis tiel elementajn lingverojn.

Haltostreko ofte anstataŭas dividostrekon (ekz. *Chamblay – familio* anstataŭ "Chamblay-familio"), kio agacetos kelkajn legantojn. Ĉapitron ok oni misnumeris sep. En interparoloj oni ellasis komojn aŭ punktojn, kiam la parolado estas interrompita de priskriba frazo. Multaj frazoj en konversacioj finiĝas per nenecesa krisigno, tiel ke oni ricevas la impreson, ke parolanto estas pli emociita ol li aŭ ŝi efektive estas.

En valora artikolo pri la "folkliteraturo" (popol-), kiu sekvas la romanon, troviĝas aserto, kiu devus esti aksiomo: "Ĉiu, kiu volas sin nomi esperantisto, devus legi minimume 30 romanpaĝojn ĉiutage." Li povus malpli bone fari ol komenci per *La mortosonorilo de Chamblay*, kies stilo estas tiel vigla kaj tiel bela, supera al tiu de ordinara krimromano.

Edward Ockey (Britio)

Fastefaperaĵo

Argentina novelaro, div. aŭtoroj. El la hispana trad. (1978, 1980, 1982) diversaj. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais, 1982 (2a eld.). 43+61+48p. 21cm. Mimeo. SAT-Broŝurservo. Tri serioj de entute 18 noveloj de 15 aŭtoroj, kun notoj. Prezo: 6,90 gld.

Ĉeĥa literaturo en Esperanto/Česká literatura v esperantu; Esperantaj verkoj far ĉeĥaj aŭtoroj/Esperantská díla českých autorů; Bibliografio 1890-1980 Bibliografie, komp. Vlastimil Novobilský (1934). Prago: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1983. 30p. 21cm. Dulingva: Esperanto-ĉeĥa. Alfabete ordigitaj listoj de verkistoj, kun detaloj pri la eldonaĵoj kaj indeksoj de tradukintoj, ilustrintoj, titoloj kaj eldonjaroj. Prezo: 4,20 gld.

Elektitaj rakontetoj de Esperanto/Shijieyu xiao gushi xuan, de Wei Wenming. Ŝanhajo: Shanghai Waiyu Yinxiang Chubanshe, 1983. Tridek rakontoj kun vortklarigoj, notoj, demandoj kaj respondoj por ĉinaj progresantoj. Prezo: 7,50 guldenoj.

Esperanto: Shijieyu sanbai ju, de Wei Yuanshu (1935). Ŝanhajo: Shanghai Waiyu Yinxiang Chubanshe, 1983. 2 + 79p. 18cm. Konversacia gvidilo por ĉinoj, kun Esperanta-ĉina vortareto. Prezo: 4,50 gld.

Fonetiko de Esperanto/Shijieyu yuyin, de Wei Yuanshu (1935). Ŝanhajo: Shanghai Waiyu Yinxiang Chubanshe, (eldonjaro ne indikita). 2 + 37p. Ilus. 19cm. Ĉinlingva priskribo de la fonetiko de la Internacia Lingvo por lernantoj. Prezo: 3,00 gld.

Formo kaj sono, red. Ilona Koutny kaj Péter Broczkó. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 64p. Ilus. N-ro 7 de *Internacia komputado*. ISBN 963 571 152 2. Dek tri artikoloj pri aspektoj de la formo kaj sono rilataj al komputado, mallongaj diverslandaj novaĵoj, sekcio pri mikrokomputiko, leteroj kaj anoncoj. Prezo: 7,50 gld.

Kantetoj karnavalparadaj, Ergoto de Bonaero (pseŭd.). Bonaero: Argentina Esperanto-Instituto, 1985. 40p. 17cm. Mimeo. Strofoj pri vortoj laŭ la aŭtoro misuzataj. Prezo: 3,30 guldenoj.

Komputada baza terminaro, G. Kalckhoff, A.C. Pick k.a. Hamburgo: Deutscher Esperanto Bund, 1985. 52p. 21cm. 369 numeritaj terminoj en kvar lingvoj, alfabete troveblaj laŭ Esperanto, la angla, franca kaj germana. Ĉiu termino havas Esperantan difinon. Prezo: 18,00 gld.

Krias mi sur la kampo (1964), Ŝibuja Teisuke (Sibuya, 1906). El la japana (1976) trad. Kinugasa Hirosi. Tokio: la tradukinto, 1985 (2a eld.). 154+4+72p. Ilus. Poemaro pri kamparana regajno de homeco; kun "Faru ni terglobon kampo nia; Respondoj pri la esperantigita poemaro". Prezo: 27,30 gld.

Lenz, Georg Büchner (1813-1837). El la germana trad. R. Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985. 26p. 21cm. Jubilea Eldonserio 2: Beletro tradukita 11. Rakonto pri la vivosorto de Michael Lenz (1751-1792), bazita sur moderne esplorita teksto (1984). Prezo: 7,50 gld.

Lisao, La, Qu Yuan (339-ĉ.280 a.K.). El la ĉina (1983) trad. Licius. Los-Anĝeleso: Esperanto-Asocio, 1984 (represo). 2+31p. Mimeo. 22cm. Traduko de la poemo "La ĉagreno", verkita de la unua granda poeto de Ĉinio; kun ampleksaj postparolo kaj notoj. Prezo: 9,00 gld.

Matematika terminaro, Daniela Deneva. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1985. 160p. Mimeo. 20cm. 753 terminoj en tri lingvoj, alfabete troveblaj laŭ Esperanto, la bulgara kaj rusa; kun bibliografio. Prezo: 8,40 gld.

Mesaĝo al la moderna mondo / Message to the Modern World (1856), tribestro Seattle (m.1866). El la angla trad. M. Westermayer. Gundelfingen: G. und M. Westermayer, 1984 (2a eld.). 16p. Ilus. 15cm. Dulingva: ISBN 3 923596 02 2. Letero pri la ideo "aĉeti teron", skribita de estro de la indiana tribo de skvamišoj al prezidanto de Usono. Prezo: 2,10 gld.

Nomaro de britaj birdoj eksterdomaj/British Bird Names (Outdoor Birds) (1985), komp. Edward Ockey (1913). Barnstead: Mondlingvaj libroj, 1986 (2a eld.). 15p. Mimeo. 21cm. Alfabete ordigita laŭ la anglaj nomoj kun ekvivalentoj de la 272 specioj en Esperanto, la latina, franca kaj germana; kun bibliografio. Prezo: 3,00 gld.

Matematika terminaro Esperanto-angla-franca-sveda, komp. Chister O. Kiselman. Uppsala: Matematika Instituto de Upsala Universitato, 1985. 4+30p. 30cm. Mimeo. Raporto 1984:14. Ĉirkaŭ 160 terminoj; kun antaŭparolo, fontindikoj, bibliografio, listo de mallongigoj kaj aldono pri operacioj kaj ties rezultoj. Prezo: 9,00 gld.

Tri noveloj, J. von Eichendorff (1788-1857). El la germana trad. R. Haupenthal. Würzburg: Eichendorff-Gesellschaft, 1985. 184p. 15cm. ISBN 90 6336 035 5. La popularaj noveloj "La marmora statuo" (1819), "La kastelo Dürande" (1837) kaj "La kidnapo" (1839) de signifa poeto de "la alta romantiko". Prezo: 33,00 gld.

Diversaĵoj:

Gluafiŝeto "Esperanto 1887-1987". Ovala (15×10cm.), memglua, plasta; kun verdaj stelo kaj teksto "Esperanto 1887-1987/ 100 jaroj de la Internacia Lingvo Esperanto" sur blanka fono. Prezo: 1,80 gld.

Insigno n-ro 19. Verda stelo sur blanka fono sub la vorto "Esperanto" sur blua fono; 10×11mm. Pinglo. Prezo: 2,10 guldenoj.

Insigno n-ro 20. Verda stelo sur blanka fono ene de verda cirklo; 9mm-ojn, ronda. Pinglo. Prezo: 2,10 gld.

Kunkantu, kantas L. Fluck kaj W. Lange, akompanas F. Kratzer kaj B. Bode. Münster: Germana Esperanta Fervojista Asocio, 1985. Kaseto de naŭ diverslandaj kaj naŭ germanaj popolkantoj; kun 8-paĝa teksto. Prezo: 24,90 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Finnlando:** Okaze de la apero de la dua eldono de la Esperanta traduko de *Kalevala*, – novaĵo, publikigita de mult-

aj ĵurnaloj en Finnlando – aperis la 2an de januaro en la svedlingva ĵurnalo de Helsinko, *Hufvudstadsbladet* (La ĉefurba ĵurnalo, 64 mil ekzempleroj), enkadra svedlingva poemo 11-versa de la pseŭdonimo "Bez" pri tio, ke la unua Esperanta eldono elĉerpiĝis. Akompanis ĝin la desegnaĵo. Kaj responde al pledo, ke la epopeo devus aperi latine, ĉar la latina estas "plene regebla" de finno, aperis leteroj de Jouko Lindstedt, provizora profesoro pri slava lingvistiko en Universitato de Helsinko, kaj Erik von Hertzen, informantaj pri la Esperantaj eldonoj la 5an kaj 8an de januaro en la finnlingva ĵurnalo *Helsingin Sanomat* (Helsinka ĵurnalo, 462 mil ekz-roj).

● **FR Germanio:** Pro la granda sukceso de sia Esperanta prospekto, la urbo Aalen ĵus publikigis duan eldonon kun pli ampleksa priskribo de la nova mineral-termika banejo; krome enestas mencio pri la loka Esperanto-grupo. La bele prezentita 24-paĝa plenkolora prospekto estas senpage havebla de: Städtisches Verkehrsamt, Rathaus Aalen, Postfach 1740, D-7080 Aalen, FR Germanio.

● **Ĉeĥoslovakio:** Ĉe Ĉeĥa Esperanto-Asocio ekzistas sesmembra kant-grupo, kiu propagandas Esperanton per t.n. kantri-muziko. La grupo "Barbuloj" ludas i.a. dancmuzikon. Ili proponas sin por distraj aranĝoj en Esperanto-renkontiĝoj, senpage kondiĉe ke oni provizas per la veturbiletoj, manĝoj kaj loĝado. La nivelon garantias ĈEA (Jilská 10, CS-110 00 Praha 1, Ĉeĥoslovakio).

● **Hinda Unio:** Okaze de la Zamenhof-Tago (la 15a de decembro) ĉirkaŭ 50 esperantistoj partoprenis tuttagan aranĝon ĉe Botanika Ĝardeno en Haora, apud Kalkato. Estis i.a. prelegoj pri la bezono de internacieco pere de Esperanto kaj la nuna situacio de la Internacia Lingvo en Hinda Unio.

● **Irlando:** En la ĵurnalo *Evening Herald* (29-1/126 000 ekz-roj) aperis artikolo pri Esperanto de s-ino M. Mullarney. Aperis ankaŭ adresoj kaj telefon-numero koncerne vesperajn kursojn.

● **Malto:** Antaŭ nelonge oni inaŭguris, ĉe la katedrala muzeo en Mdina, novan ĉambron entenantan manuskriptojn, librojn kaj tradukitajn verkojn de la malta nacia poeto Dun Karm (1871-

● Sovetunio: La foto montras la prezidanton de Kujbiseva Eo-Klubo, Igor Fejgin (plej maldekstre), Ilja Vasiljev, prezidanton de Jaroslavla Eo-Klubo (trian de mald.), François Akpa, studenton el Benino (kvaran de dekstre), kaj aliajn aktivulojn, kiuj partoprenis en la jubilea 25a Centra-Rusia Regiona Esperantista Renkontiĝo, aranĝita en Internacia Junulara Centro "Rostov Velikij" (Jaroslavla provinco) de la Junulara Komisiono ĉe Asocio de Sovetiaj Esperantistoj kaj Jaroslavla Eo-Klubo (1-3 nov.). Partoprenis pli ol cent personoj el 15 urboj.

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

"La gazeto ne nur estas en si mem interesa, stimula kaj pedagogie valora; mi trovis ĝin la plej bona propagandilo, kiun mi havas. Tuj kiam homoj vidas, ke ekzistas serioza, inteligenta kaj dece prezentita gazeto pri aktualaj aferoj kaj kulturaj fenomenoj, tio ege altigas la prestiĝon de Esperanto."

Marjorie Boulton pri MONATO

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: **MONATO,** Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).

● Vjetnamio: Parto el la 45 gejunuloj, kiuj lernas Esperanton ĉe Junulara Kulturdomo (urbo Hô Chí Minh), sub la gvido de s-ro Ngô Chân Lý.

1961). Tie elmontriĝas ankaŭ verkoj de li, tradukitaj en Esperanton de Carmel Mallia, kaj lia ununura originala poemo en Esperanto, "Penso printempa", verkita en 1901.

● En Liceo Vassalli instruas Esperanton al interesitaj studantoj Anthony Mercieca, kies normala instru-objekto estas la malta lingvo.

● **Srilanko:** La 2an de januaro, en Nugegoda apud Kolombo, okazis la 2a Srilanka Esperanto-Tago. Partoprenis 33 personoj, ĉefe novaj studantoj de la Internacia Lingvo. Juna svisa esperantistino, Nicole Beroud, portis tien informajn materialojn, kiujn disponigis UEA. Srilankanoj multe ĝojis pri tiu materialo kaj bonvenigus ankaŭ vian kontribuon de Esperantaj libroj aŭ periodaĵoj. Adreso: Esperanto-Centro Srilanka, 71 Pagoda Para, Nugegoda (Colombo), Srilanko.

● **Usono:** La nova eduka korporacio senprofitcela Intertalk (Interparolo) ricevis subvencion de 5 000 kanadaj dolaroj el Eduka Fondaĵo Carson por krei novan porinfanan instrukurson por precipe usonaj publikaj lernejoj.

● **Zairio:** Ok Esperanto-kluboj en Zairio sendis raportojn pri sia pasintjara agado. Ili havas kune 159 membrojn, el kiuj 93 havas malpli ol 26 jarojn. Okazis 17 elementaj kaj tri duagradaj kursoj. Ĉiuj ok kluboj interrilatis kun almenaŭ du aliaj enlandaj grupoj, dum tri interrilatis kun po unu eksterlanda grupo (el Francio, Belgio, FR Germanio).

Fake

● **Akademio:** Pro tajp-eraro elfalis el la listo de artikoloj en la dua volumo de la festlibroj *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo* (vd. *Esperanto*, p.206-8/85) la kontribuo de d-ro André Albault, *La Akademio de Esperanto: starigo kaj esenca rolo*.

● **Arkitekturo:** Centro pri Turisma Reklamo eldonis plenkoloran faldfolion pri "Bulgara arkitekturo". Gi haveblas de: Bulgara Asocio pri Turismo kaj Feriado, pl. Lenin, Sofia, Bulgario.

● **Bibliografioj:** La dokumenta kaj esplora fako de Kultura Centro Esperantista (CDELI, Urba Biblioteko, B.P.5038, CH-2300 La Chaux-de-Fonds 5, Svislando), kunlabore kun la urba biblioteko, pretigos kaj eldonos en jaraj kajeroj bibliografion de Esperanto kaj interlingvistiko. Por tio ĝi kunlaboras ankaŭ kun Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. La bibliografio registros gazet-artikolojn, librojn, grup-informilojn, raportojn, kongresaĵojn, reklamilojn ktp. Tial oni petas senpagan alsendon de ĉiu eldonaĵo en aŭ pri Esperanto, same kiel delonge devas ricevi Internacia Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko Hodler de UEA.

● **Ciganoj:** En junio ĉi-jare okazos en Sarajevo, Jugoslavio, simpozio pri "La lingvo kaj kulturo de la ciganoj". La organizantoj, i.a. Internacia Asocio de Ciganoj, akceptas referaĵojn ankaŭ en Esperanto. La laborlingvoj tamen estos la angla, rusa kaj serbokroata. Pliajn informojn donas: Eo-Ligo de BkH, D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio.

● **Dancado:** La nomon Esperanto oni donis jam al cigaroj, kurĉevalo, muzikpeco, krom al ĉi tiu revuo! La 12an de novembro la danco "Esperanto" spertis sian "mondan premieron" en la novjorka teatro Joyce. La koreografo estis Molissa Fenley, kun muziko de la

● Kongresoj: Dum la prestiĝa inaŭguro de la pasintjara 21a Kataluna Kongreso de Esperanto prezidis s-ro Miquel Coll i Alentorn (tria de dekstre), prezidanto de la kataluna parlamento. La 231 partoprenantoj igis la kongreson la plej granda en la historio, dum du televidstacioj kaj pluraj radiostacioj kaj jurnaloj raportis pri ĝi entute 24 fojojn. Samtempe okazis la 25aj Internaciaj Floraj Ludoj, kie festparolis estrarano de UEA Baldur Ragnarsson. La Rozon gajnis JoséF ernáandez Arroyo el Madrido pro la poemo "Nenio estas kiel via ventro".

● **Régulo: Ankoraŭ plian gravan honoron lastatempe ricevis prof. Juan Régulo Pérez. Lia naskiĝmunicipo, Garafía (Kanariaj Insuloj), pere de sia magistrato, elektis lin "Plej Amata Filo" kaj donis lian nomon al unu el la ĉefaj stratoj de la centro de la komunumo. La foto montras la arte pentritan pergamenon dum la urbestro ĝin transdonas al Juan Régulo (maldekstre). La transdonon partoprenis i.a. la prezidantino de la insula registaro, vicrektoro de Universitato de La Laguna, delegito de la ŝtata registaro kaj reĝa ŝtata senatano el Madrido. (Vd. ankaŭ *Esperanto*, p. 76 kaj 206/1985.)**

japana popularmuzika komponisto Sakamoto Ryuiti. La postan tagon aperis recenzo en la ĵurnalo *New York Times* (873 mil ekzempleroj), kiu diris i.a., ke ne temis pri "Esperanto de la dancado", sed ĝi "neatendite atingas paceman rezulton".

● **Filatelo:** La aŭstra poŝto de la 2a de januaro uzas oficialajn poŝtstampojn, kies germanlingva teksto legiĝas "Esperanto/internacia lingvo/Intern. Esperanto-Muzeo en Vieno". Subvenciis la Ministerio pri Trafiko.

● **Literaturo:** La Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio en Stara Zagora organizis internacian literaturan konkurson pri "La revolucia pasinteco, nuntempo kaj estonteco de Stara Zagora". La limdato estas la 20a de februaro. Pliajn informojn pri la konkurso kaj la loko haveblas de: Literatura Konkurso, Distrikta Estraro de BEA, bul. "G. Dimitrov" N 101/A, BG-6000 Stara Zagora, Bulgario.

● **Marŝado:** Malgranda grupo da esperantistoj ĉi-jare la duan fojon partoprenis en la Jerusalema Marŝado: unutaga pilgrimado, kiu antikve estis la Festo de Laŭboj, oferado por pardonpeti pro la pekoj de ĉiuj nacioj de la mondo.

● **Poezio:** La 16an de februaro Triesta Esperanto-Asocio (Italio) festpremiis la gajnintojn de ĝia Poezia Konkurso "Internacia Amikeco" 1985. Juĝis la 43 poemojn el 21 landoj Aldo de' Giorgi, d-ro Piergiorgio Soranzo kaj d-ro Mauro Nervi. La unuan premion gajnis K. Terving (Belgio) pro "Lao Tseu", la duan s-ino Lilli Giloteaux (Francio) pro "Nia festo" kaj la trian Antun Šimunić pro "Figura senco de ponto".

● En preparo estas antologio de tutmonda porinfana poezio, paralele en Esperanto kaj nacilingve. Oni petas kontribuojn de kompetentuloj per du ĝis kvin tradukoj (eĉ jam aperintaj) el la verkoj de elstaraj propralandaj aŭtoroj, kun indikoj pri iliaj naskiĝjaroj ks. Adreso: O. Kníchal, Hungara Esperanto-Asocio (*La juna amiko*), Pf.193, H-1368 Budapest, Hungario.

● **Junularo:** Dum la pasintaj naŭ monatoj la organizaĵo Geonkloj Esperantistaj elspezis 40 britajn pundojn (160 gld.) por poŝtkostoj. Tio estas mezuro de ĝia agado, sed nun la servado bezonas pli da mono. Geonkloj Esperantistaj helpas junajn esperantistojn ĝis 16-jarajn per koresponda kunligado kun plenkreskuloj, ĉar la infanoj ofte ne havas sufiĉan sperton por korespondi Esperante kun samaĝuloj. La antaŭa administranto, Bert Sullivan, havigis "geonklojn" por 1 376 infanoj en 25 landoj. Informpetojn, proponojn kunlabori kaj donacojn (i.a. internaciajn respondkuponojn) oni sendu al William Simcock (Clayton House, Butterton, Leek, Britio ST13 7SR; poŝtĝira n-ro 44 214 0401).

● **Geologio:** Geologia Instituto de Akademio de Sciencoj de Taĝika SSR (Sovetunio) planas eldoni, sub aŭspicio de la Geologia Sekcio de Internacia Scienca Asocio Esperantista, la sesan volumon de la konata Esperanta artikolaro *Geologio internacia*. La eldonkvanto de la libro kaj ĝia apero dependos de la nombro de antaŭmendoj. Mendojn oni sendu al la komerca eldonejo VO Meždunarodnaja Kniga, ul. Dimitrova 39/20, SU-113095 Moskva, Sovetunio, aŭ al unu el ĝiaj agentejoj tra la mondo.

● **Kolektaĵoj:** Venontjare okazos Ekspozicio de Kolektaĵoj honore al la Centjara Jubileo. La tri sekcioj de la ekspozicio estos: 1) D-ro L.L. Zamenhof sur bildkartoj, 2) Bildkartoj kun surskriboj en Esperanto, 3) Urboj de Universalaj

Persone

● **Kádár:** Okaze de la 25-jara datreveno de la fondo en 1961 de la revuo *Hungara vivo*, János Kádár (vd. la



foton) ĝenerala sekretario de Hungara Socialisma Laborista Partio, skribe salutis la redakcion kaj legantojn i.a. per la vortoj: "La lingvo Esperanto proksimigas la homojn unu al la alia, servas la interkompreniĝon, kaj per tio ĝi kontribuas al la firmigo de la amikeco kaj fido inter la popoloj."

Kongresoj de Esperanto (prefere en la jaroj de la koncerna UK). Preparas la ekspozicion la konata bulgara kolektanto-esperantisto Georgi Litov, sub la aŭspicio de Bulgara Esperantista Asocio. Oni petas kontribuojn el la tuta mondo, ĉu donace, ĉu rekompence, al: Georgi Litov, Hipodruma 34-A, BG-1612 Sofia, Bulgario.

● **Scienco kaj tekniko:** Sciencist-Teknikista Esperanto-Asocio sub Ĉina Akademio de Sciencoj decidis okazigi Internacian Akademian Konferencon pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto de la 22a ĝis la 24a de julio, tuj antaŭ la pekina UK. La temo estos "La hodiaŭaj kaj morgaŭaj scienco kaj tekniko". Okazos interparoloj en fakaj grupoj, vizito al institutoj de Ĉina Akademio de Sciencoj, renkontiĝoj kun pliaj samfakuloj kaj diskutoj pri kunlaboro. Oni petas ricevi proponojn pri prelegtemo(j), foton kaj mallongan aŭtobiografion antaŭ la 15a de marto kaj la traktaĵojn mem antaŭ la 15a de aprilo. Oni planas publikigi elektitajn studojn. Pliajn informojn donas s-ino Wang Yuchun, Esperanto-Asocio sub Ĉina Akademio de Sciencoj, Fuxingmenwai Sanlihe, Beijing, Ĉinio.

● Aperis la unua numero de la nova ĉina gazeto *Tutmondaj sciencoj kaj teknikoj*. En ĝiaj 48 paĝoj troviĝas sciencaj artikoloj, novaĵoj kaj komentoj jen en Esperanto, jen en la ĉina, jen en ambaŭ lingvoj, kiel ankaŭ la komenco de angla-Esperanta-ĉina komputika vortaro. La eldonanto, Scienca kaj Teknika Esperanto-Asocio sub Ĉina Akademio de Sciencoj (vd. la adreson tuj supre), celas kvaronjaran aperigon. Ĝi kostas 3,20 usonajn dolarojn jare aŭ 7,80 dolarojn por tri jaroj.

● **Humuro:** **En pasint-novembra numero de la fama brita humura kaj satira periodaĵo *Punch*, kiu aperas en 93 000 ekzempleroj, oni presis la apudan ŝercan desegnaĵon de Banx kun la teksto: "Ne multaj viroj parolas *nur* Esperanton."**

● **Pentrado:** La Esperanto-klubo de Nico, Francio, aranĝas partoprenonte limigitan kurson por esperantistaj pentrantoj de akvareloj. Ĝi okazos en la unua duono de aŭgusto en la ekstermovada aranĝo Artaj Renkontiĝoj de Gattières. Pliajn informojn donas Jean-Pierre Cavelan, 164 chemin de Saquier, F-06200 St. Isidore, Francio.

Oficiala Informilo

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ
Belgio: Robert Burnay. FR Germanio: D-ro Rudolf Fischer. Luksemburgo: S-ino Claude Nourmont. Japanio: Goto Mituo.

SOCIETO ZAMENHOF 1985
Nederlando: S-ino S.A.K. van der Zee.

DONACOJ 1985 (Gld.)
ĝis la 31a de decembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: anonime 10,23. Finnlando: S-ino T. Österman 50,00. FR Germanio: H. Schindler 28,40. Japanio: K. Ueki 139,77. Nederlando: S-ino B. Muízelaar 100,00; S-ino S.A.K. v.d.Zee 100,00; R. Moerbeek 100,00. Svedio: J. Hammarberg 20,00. Sumo pasintjara 27 497,65.

FONDAĴO CANUTO: Belgio: S-ino S. De Weerd 68,05. FR Germanio: H. Bily 61,82. Nederlando: S-ino E.M. Maasbommel 100,00; R. Moerbeek 100,00. Sennomulo 2 000,00. Diversaj malgrandaj 5,62. Sumo pasintjara 3 837,52.

FONDAĴO CED: Sumo pasintjara 27,00.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Anonime: 561,34. Hispanio: S-ino M. Pi Maynar 100. Venezuelo: Venezuela Eo-Asocio 50. Sumo pasintjara $3 891,34.

ĜENERALA KASO: Anonime: 33,00. Sennomulo 1 000,00. FR Germanio: M. Gründler 39,45; K. Simon 39,45. Nederlando: "Merkurio" 150,00; G. Ellerman 30,00; W. Akkerman 72,00; S-ino S.A.K. v.d.Zee 150,00; R. Moerbeek 172,00. Svislando: P. Scherer 13,40. Diversaj malgrandaj 58,85. Sumo pasintjara 10 436,07.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: Sumo pasintjara 3 853,45.

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo S-ino G. Wolff 54 377,14. Sumo pasintjara 56 676,99.

FONDAĴO KER DE TEJO: Eŭropa Konsilio 3 431,02. Sumo pasintjara 3 431,02.

JUBILEA JARO: FR Germanio: D-ino C. Spruch 200,00. Kanado: S-ino B. Salt 20 942,50. Nederlando: S-ino E.M. Maasbommel 50,00; S-ino G.Hos 30,00; R. Moerbeek 100,00. Nov-Zelando: Eo-Forumo de Auckland 70,50. Sumo pasintjara 23 522,64.

PROPAGANDA KONTO: Sumo pasintjara 212,38.

FONDAĴO TEJO: Nederlando: S-ino E.M. Maasbommel 100,00. Sumo pasintjara 531,00.

BUDAPEŜTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): Sumo pasintjara 1 860,72.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Sumo pasintjara 265,79.

POR RENOVIGO DE LA DOMO: Sumo pasintjara 42 133,04.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

La membraro de UEA en 1985

Lando	AM	IM	Sumo
Albanio	0	3	3
Alĝerio	0	1	1
Andoro	0	1	1
Angolo	0	1	1
Argentino	272	63	335
Aŭstralio	135	105	240
Aŭstrio	141	62	203
Bangladeŝo	0	1	1
Belgio	741	264	1005
Bermudo	0	1	1
Bocvano	0	1	1
Bolivio	0	2	2
Brazilo	387	226	613
Britio	823	334	1157
Bulgario	5028	96	5124
Burundio	0	1	1
Ĉeĥoslovakio	3527	112	3639
Ĉilio	30	14	44
Ĉinio	1127	60	1187
Danlando	250	105	355
Ebura Bordo	0	4	4
Egiptio	0	2	2
Ekvadoro	0	1	1
Filipinoj	0	1	1
Finnlando	542	221	763
Francio	549	624	1173
Gabono	0	1	1
Gambio	0	1	1
Gano	0	6	6
Germana DR	400	21	421
Germanio FR	834	492	1326
Greklando	397	32	429
Gvatemalo	0	1	1
Haitio	0	2	2
Hinda Unio	0	15	15
Hispanio	600	180	780
Honkongo	0	7	7
Hungario	3080	164	3244
Indonezio	0	4	4
Irano	0	102	102
Irlando	55	18	73
Islando	18	40	58
Israelo	264	65	329
Italio	1182	253	1435
Jamajko	0	1	1
Japanio	1071	375	1446
Jordanio	0	1	1
Jugoslavio	1200	200	1400
Kamerunio	0	1	1
Kanado	188	89	277
Kenjo	0	1	1
Kolombio	30	47	77
Kongo	0	2	2
Korea Resp.	415	96	511
Kostariko	0	2	2
Kubo	100	23	123
Libano	0	2	2
Libio	0	1	1
Luksemburgio	94	7	101
Madagaskaro	0	1	1
Malajzio	0	3	3
Malto	50	2	52
Maroko	0	2	2
Meksikio	20	24	44
Mongolio	0	3	3
Nederlando	284	420	704
Nepalo	0	3	3
Nigerio	0	2	2
Nikaragvo	0	1	1
Norvegio	309	94	403
Nov-Zelando	77	77	154
Omano	0	1	1
Pakistano	0	11	11
Papuo-Novgv.	0	1	1
Peruo	15	9	24
Pollando	6790	118	6908
Portoriko	0	2	2
Portugalio	295	32	327
Reunio	0	2	2
Rumanio	0	28	28
Ruando	0	8	8
Salvadoro	0	1	1
Sanmarino	0	1	1
Senegalio	0	1	1
Singapuro	0	1	1
Sirio	0	1	1
Sovetunio	0	92	92
Srilanko	0	5	5
Sud-Afriko	43	24	67
Sudano	0	1	1
Sud-Jemeno	0	1	1
Svazilando	0	1	1
Svedio	1061	370	1431
Svislando	190	147	337
Tajlando	0	3	3
Togo	0	2	2
Tunizio	0	2	2
Turkio	0	3	3
Urugvajo	0	3	3
Usono	330	423	753
Vatikano	0	1	1
Venezuelo	24	32	56
Vjetnamio	0	7	7
Zairio	52	11	63
Zambio	0	1	1
105 landoj	**33020**	**6536**	**39556**

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBROSTATISTIKO DE UEA POR 1984 KAJ 1985

Kategorio	**1984**	**1985**
Membro-Jarlibro	1177	1255
Membro-Abonanto	3694	3859
Dumviva Membro	982	967
Honora Membro	29	26
Juna M-Jarlibro	198	200
Juna M-Abonanto	192	229
Individuaj Membroj	**6272**	**6536**
Aligitaj Membroj	23460	23254
Junaj Al. Membroj	9463	9766
Membroj entute	**39195**	**39556**
Societo Zamenhof	167	147
Abonoj *Esperanto*	275	272
Kolektivaj ab. *Eo*	1005	1150
Abonoj *Kontakto*	462	409
Kolektivaj ab. *Kto*	610	894
Patronoj TEJO	65	75
Kotizoj entute	**41779**	**42503**

Noto: La nombro de membroj de 1984 estas ĝisdatigita laŭ la finsumoj donitaj en la jarraporto (*Esperanto* 6/1985, p.104). Kutime tio ne okazas.

Nekrologo

KIRK CROCKETT (1901-1985) forpasis en Victoria, Kanado, kie li estis fakdelegito. Li estis dumviva membro de UEA kaj finance helpis la Novjorkan Oficejon.

ALICE EBERHARD, Svislando, forpasis en julio. Ŝi estis dumviva membro de UEA.

LAZARUS BRIEGER (1897-1985) mortis la 8an de aŭgusto en Rio-de-Ĵanejro. Li multe laboris por pacaj rilatoj inter la brazilaj Esperanto-organizaĵoj kaj estis ĉefa motoro en la varbado por UEA en Brazilo. Li krome instigis la renaskiĝon de Brazila Esperantista Junulara Organizo. Dum pluraj jaroj li faris sekretariajn laborojn por Brazila Esperanto-Ligo, ties librostoko kaj biblioteko, al kiu li donacis sian 500-titolan libraron.

ELIZABETH BARON (1911-1985) forpasis en Darwen, Britio, kie ŝi estis la delegito.

ERICH GUNKEL, kelkjara membro de Societo Zamenhof, forpasis en Pinneberg, FR Germanio, kie li estis la delegito.

ALICE FRÜH forpasis la 12an de aŭgusto en Svislando. Ŝi siatempe kunlaboris por *Svisa antologio* (1939).

ALDO CONTI mortis antaŭ nelonge en Asti, Italio, kie li estis la delegito.

KORNELIS G.J. de JONG (1902-1985), teknika inspektoro, forpasis la 1-an de decembro en Nederlando. Li lernis Esperanton en 1930 kaj aktivis inter esperantistaj fervojistoj en Amsterdamo. Li redaktis (1950-1958) la oficialan organon de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), kies prezidanto li estis de 1958 ĝis 1968. En 1969 li ricevis la oran medalon de la fervojista kultura asocio FISAIC. De 1975 li estis honora membro de IFEF.

INGVAR LAGERSTRÖM (1915-1985) mortis antaŭ nelonge en Gotenburgo, kie li estis fakdelegito. Li estis la kasisto de la sveda sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia.

RAGNHILD LØNBLAD (1910-1985), dumviva membro de UEA, mortis en Roslev, Danlando, kie ŝi estis la delegito.

LORCÁN ÓhUIGINN (1910-1985), emerita parlamenta raportisto, mortis la 6an de decembro en Otavo, Kanado, kie li estis fakdelegito pri juro. Li estis membro de UEA ekde 1938, poste delegito en Dublino, Irlando, kaj, elmigrinte, dum jaroj estrarano de Kanada Esperanto-Asocio.

ELSA SCHWEIZER (1890-1985), dumviva membro de UEA kaj honora membro de Esperanto-Societo de Zuriko (Svislando), mortis la 8an de aŭgusto. Ŝi aktivis por la societo dum 62 jaroj.

JAN DE VRIES

Dek ok monatojn post la forpaso de la edzino, Dirkje, mortis je la 6a de januaro 1986 en Leeuwarden (Frislando) Jan de Vries, 94-jara. La geedzoj lernis Esperanton jam antaŭ la Dua Mondmilito kaj ĉiam estis fidelaj anoj de la movado.

ANTONIJE SEKELJ (1907-1986), unu el la plej aktivaj jugoslavaj esperantistoj, mortis la 24an de januaro. Li lernis Esperanton en 1952, poste instruis kaj verkis plurajn kursgvidilojn kaj *Serb-kroata-Esperanta vortaro* (lasta eld. 1967). Li estis prezidanto de Esperanto-Societo de Beogrado ekde 1955 kaj de Serbia Esperanto-Ligo (1956-61), sekretario de Jugoslavia Esperanto-Instituto kaj ĉefo de ĝia Sekcio por Instruado (1962-65). Ekde 1959 li estis komitatano de Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj de UEA (ĝis 1967). Liaj tradukoj el kaj en Esperanton estas tro abundaj por mencii.

ARTHUR VELLOZO DA SILVEIRA VASCONCELLOS (1904-1985) mortis la 26an de decembro en San-Paŭlo, Brazilo. Li estis fakdelegito pri radioamatorismo en Alto Paraíso, kie li fondis la bienon-lernejon "Bona Espero".

NADĚŽDA ZEDNÍČKOVÁ (1937-1985) forpasis aŭtune en Lanškroun, Ĉeĥoslovakio, kie ŝi estis la delegito.

Anoncetoj

__Tarifo:__ Ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj bonvolu vidi la duan kovrilan paĝon.

Hola gesamideanoj! Se por vi Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ideo kaj „nova sento", tiam skribu al: Homarana Asocio, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio. Ni havas ion interesan por vi!

Konkurson okaze de Internacia Jaro de Paco aranĝas la Esperanto-grupo de Ŝverin. Inter la partoprenantoj ni lotumos semajnan senpagan restadon en nia urbo. Vian rakonton, poemon, kanton, desegnaĵon ktp. pri "La paco kaj ni" sendu ĝis la fino de majo 1986 al: Kulturbund der DDR, Kreisvorstand des Esperanto-Verbandes, Wilhelm-Pieck-Str. 8, DDR-2750 Schwerin, Germana DR.

Kun vegetaranoj esperantistaj en ĉiuj landoj deziras korespondi membroj de Zulia Esperanto-Asocio, Vegetarana Sekcio, Calle 79 No.3C-72, Maracaibo-4002, Venezuelo.

Lernantino deziras korespondi kun samaĝuloj: Rumjana Velikova, ul. Patriarh Evtimij 30, BG-5250 Svištov, Bulgario.

Internacia geedziĝo okazis en la litova ĉefurbo Vilnius la 14an de decembro. La nova paro deziras korespondi kun la tuta mondo pri diversaj temoj, kolektas bildkartojn pri hundoj. Rožė Aukštikalnytė (25-jara litovino) kaj Csaba Székely (30-jara hungaro), Zsivánovics u. 8 fsz.2, H-6500 Baja, Hungario.

Turisman renkontiĝon organizos la Esperanto-Societo Kebekia la 5an kaj 6an de aprilo 1986 en la urbo Iberville, Kebekio. Estos regiona vizito kaj tradicia kebekia acersukera festo. Por informoj bonvolu kontakti: Esperanto-Societo Kebekia, C.P.126, Succursale Beaubien, Montréal, Québec H2G 3C8, Kanado.

Kiu volas ricevi jarkolektojn aŭ ekzemplerojn de *Heroldo* (jaroj 1959-65 kaj 1978-86) bv. skribi al J.C. van Veenendaal, Prinseneiland 73D, NL-1013 LM Amsterdam, Nederlando.

Deziras korespondi 24-jara s-ro Wang Thomas S., s/c Ndig-Djob Nicolas, B.P.1916, Douala, Kamerunio.

Studento, prilaboranta magistran disertacion, serĉas sciencajn materialojn pri la filozofiaj kaj religiaj opinioj de L.L. Zamenhof. Andrzej Lewkowicz, ul. Panewnicka 76, PL-40 760 Katowice, Pollando.

27-jara bakisto, fraŭlo, deziras korespondi; kolektas bildkartojn, diskojn kaj kasetojn. Karel Krejča, Pod Hybšmankou 2346/17, CS-150 00 Praha 5 – Smíchov, Ĉeĥoslovakio.

16-jara lernantino deziras korespondi kun multaj landoj; kolektas afiŝojn kaj orelringojn: Vasilka Vaseva, ul. Ekzaeh Josif IV2 et.2 ap.3, BG-2500 Kjustendil, Bulgario.

Sportemuloj: Se vi interesiĝas pri iu sporta fako, bonvolu skribi al ĉi tiu adreso: Esperantista Sporta Klubo (D.D.J.S.)*, 26 Rue de la Baïsse, F-69625 Villeurbanne-Cédex, Francujo. [* estas mallongigo de mia administrado.] Ekzemple, sendu nur la jenajn informojn: Nomojn familian kaj personan, adreson, preferatan sporton, (interesiĝon pri la regularo, tekniko, arbitraciado ktp.). Ĉiun duan monaton, se eblas laŭnecese, mi sendos informojn al ĉiuj.

Bibliografio de Esperanto kaj interlingvistiko: Kunlaboru por pretigi kiel eble plej kompletan bibliografion de Esperanto per la sendo de specimena ekzemplero de ĉiuj viaj eldonaĵoj: libroj, gazetoj, grup-informiloj, raportoj, kongresaĵoj, reklamiloj ktp. Adreso: CDELI, Bibliografio de Esperanto, Urba Biblioteko, Boîte postale 5038, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

SENNACIULO

Ĉu vi konas ĝin?
Monata organo de SAT

– Laborista esperantismo – Kontraŭ rasismo – Kontraŭ faŝismo – Por la homaj rajtoj – Eĥo de sociaj luktoj – Donas la parolon al ĉiuj laboristaj tendencoj...

Provekzemplero kun abontarifo havebla kontraŭ internacia respondkupono ĉe:
SAT, 67 Av. Gambetta, F-75020 Paris

Marjorie Boulton

FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

La nun jama fama legolibro por progresantoj, speciale komisiita de UEA, kun 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo.

"Ĉi tiu riĉ-enhava kaj lingve bonega libro estas skribita en stilo, kiun oni sen pli povas nomi modela. Kvankam la aŭtorino klopodas por ke la libro estu gradigita de tre facila al malpli simpla, ni nenie trovas stilon infanan, nematuran kaj tedan, kiel ofte en lerniloj. Ĉi tie ni renkontas Esperanton en ĝia pura formo, klara senartifika kaj ofte tre originala."

H.A. de Hoog (*Dia regno*, *n*-ro 1/1985)

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1984. 432p. Ilustrita de Alex Brychta. 21cm. ISBN 92 9017 028 X. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 36,00 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

Tradukantoj (-istoj)

Franca firmo serĉas tradukantojn (-istojn) por traduki el Esperanto en la anglan, germanan, hispanan kaj poste nederlandan kaj lingvojn nordiajn, rusan, ĉinan, japanan ktp. Temas pri maŝinoj kaj aliaj iloj uzataj en la nutraĵindustrio. Ni bezonas unue francan esperantiston por kontroli kaj eventuale traduki la tekstojn en perfektan Esperanton. Ĉiu teknika dokumento ricevos la jenan alineon: "Ĉi tiu dokumento estis tradukita pere de Esperanto, kiu estas internacia lingvo facila, ege riĉa kaj je ĉies dispono". Tiu ĉi alvoko havas ankaŭ kiel celon kontribui al la ekkonstruo de internacia, Esperanta, tutmonda tradukreto, kiu verŝajne (kaj bedaŭrinde) estos multe pli efika por disvolvi Esperanton ol nia idealismo. Nia adreso estas: C.M.I.A. Bodson, Montigny en Cis, F-59225 Clary, Francio. ☎ 27 85 31 10. Telekso: 820840 F.

Supren al la jubileo!

1985 1822
1984 1548
1983 1342
1982 865
1981 857
1980 704

La Movado strečas siajn fortojn cele al la Jubileo. ***Kontakto*** ankaŭ. Ĝi festas propran jubileon: aperos la centa numero fine de 1986. Ĉiuj okuloj rigardas do supren. Feliĉe, la abonciferoj ankaŭ supreniras. Aldoniĝu mem al tiu kresko, abonu nun por 1986. La dumonata gazeto temas pli pri la mondo ol la movado, kaj taŭgas ankaŭ por novaj lernantoj de Esperanto. Kotizperantoj de UEA akceptas abonojn, plejofte en la loka valuto. Kresku kun ni!

kontakto

1964–1986 Cent numeroj de kreskanta kontakto

20a Konferenco de ILEI

De la 12a ĝis la 19a de julio 1986 okazos la *20a Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj* (ILEI) en la Katolika Universitato de Louvain-la-Neuve (situanta inter Namur kaj Bruselo). La konferenco samtempe havos la karakteron de Eŭropa Kulturforumo.

Dum la konferenco okazos kursoj de tri gradoj, kulturaj kaj artaj aranĝoj, distrado kaj ripozado.

La konferenca devizo estas: *"Ne nur la pedagogoj edukas"*. Pro tio, ni invitas ĉiujn seriozajn interesiĝantojn kaj ni esperas, ke la esperantistoj, kiuj ne vojaĝos al Pekino, renkontiĝos en Louvain-la-Neuve (Belgio).

Kotizo (inkluzivas loĝadon, manĝadon kaj konferencan kotizon): 7 800 belgaj frankoj. Ekskursoj estos aparte mendeblaj kaj pagendaj dum la konferenco.

Loka Kongresa Komitato (LKK): S-ro Emile Van Damme, Albert I. straat 44, B-1750 Schepdaal, Belgio. ☎ (02) 569 17 83.

Kontoj: *LKK* (Belgio): poŝtĝirkonto 000-053.34.26-23
UEA (Nederlando): poŝtĝirkonto 37 89 64
(por UEA-konto ilek-a)
ILEI (Svedio): poŝtĝirkonto 68 21 17-7
(Södra Rörum pl.455, S-242 00 Hörby)
aŭ pagi per internacia poŝtmandato.

Dorse de la pagilo, bonvolu nepre mencii "20a Konferenco de ILEI/28.14", viajn kompletajn nomon kaj adreson kaj vian alventagon. Pliaj informoj haveblas de la Loka Kongresa Komitato.

Sciencaj libroj de UEA/SEC

Ĉu vi konas la teron?, Endre Dudich. Budapeŝto, 1983. 150p. (+68p. da fakaj anoncoj). 23cm. ISBN 963 571 080 1. Altnivela, sed populariga enkonduko en ĉiujn branĉojn de la geologio, kun abundaj figuroj kaj tabeloj. Prezo: 12,00 gld.

Geologio internacia, vol.5, red. Endre Dudich. Budapeŝto, 1984. 172p. (+83p. da fakaj anoncoj). 21cm. ISBN 963 571 123 9. Dek sep studoj de diverslandaj fakuloj, kun mapoj, figuroj, grafikaĵoj kaj suplementa faka tabelaro. Prezo: 9,00 gld.

Molekuloj, János Nyilasi. El la hungara trad. Lajos Kovács. Budapeŝto, 1984. 118p. 20cm. ISBN 963 571 145 X. Traktas en populariga maniero fundamentajn problemojn de la kemio, kun aparta atento al kemiaj ligoj en vivaj organismoj kaj aktuala esplorado; abundaj figuroj kaj tabeloj. Prezo: 9,00 gld.

Perkomputila tekstoprilaboro, red. I. Koutny. Budapeŝto, 1985. 336p. 22cm. Ilus. ISBN 963 571 147 6. Dudek unu studoj pri aktualaj aspektoj de la aŭtomata tekstoprilaboro; kun ampleksa bibliografio, biografiaj notoj kaj resumoj en la angla kaj rusa. Prezo: 30,00 gld.

Radioteknika artikolaro, red. László Szilvási. Budapeŝto, 1984. 64p. (+20p. da fakaj anoncoj). 24cm. ISBN 963 571 166 6. Dudek tri altnivelaj fakaj artikoloj, abunde ilustritaj, kun terminareto kaj bibliografio. Prezo: 7,50 gld.

Sciencaj komunikaĵoj, red. A. Lukács. Budapeŝto, 1985. 96p. Ilus. 24cm. *N-ro 8: Tekniko*. Inercirado, sciencaj nocioj, vakuotekniko, metalforteco, ŝutaĵ-transporto, sismiko, metaltranĉado, leviloj, kondukmaterialo. *N-ro 9: Ter-sciencoj*. Paleografio, tertremoj, arkeologio, zoografio, astronomio, minado. *N-ro 10: Komunikado*. Lingva komunikado, perkomputilaj tradukado kaj tekstoprilaboro, edukado kaj la homa cerbo, radiofrekvencaj kabloj, dentrada transmisio. Prezo: po 9,00 gld. por numero.

Rabato de unu triono por aĉeto de minimume tri ekzempleroj al la sama adreso, plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

LA NOBLA KORANO

La unuaj du Esperantaj eldonoj de ĉi tiu fundamenta verko de la monda kulturo jam delonge elĉerpiĝis. Nun estas aĉetebla represo de la dua eldono, pretigita en Irano. La bindita libro prezentas la koranajn tekstojn paralele en Esperanto kaj la araba.

"Neniu povas pretendi, ke li diris la lastan vorton pri la Korano. Kiel la universo, ĝi estas senlima. Ĝi estas senkompare riĉa kaj multaspekta."

Muhammad Zafrulla Khan,
El la Antaŭparolo de la dua Esperanta eldono

La nobla Korano. Tradukis Italo Chiussi (1919-1973). Tehrano: 1978 (sen indiko). Represo laŭ la dua eldono de TK en 1970. 692p. 22cm. Bindita. *Serio Oriento-Okcidento, n-ro 10.* Ĝis la 31a de marto validas **speciala prezo ĉe la Libroservo de UEA**. Anstataŭ 66 guldenoj, ĝi kostas **nur 36 guldenojn!** Kontraŭ ĉi tiu prezo ne validas la kutima rabato por kvanta mendo, kaj aldoniĝas la kutimaj sendokostoj de 10%.



Jus aperis

Amo kaj morto en Balio

de Vicki Baum

Verko pri la aŭtentika tradicia vivo de la balianoj kaj ties moroj. En la formo de romano, ĝi rakontas pri homaj sortoj dum historiaj okazaĵoj ĉirkaŭ la renkontiĝo kun la nederlanda kolonia potenco en la pasinta jarcento.

Kun kovrilo speciale desegnita de Peter Oliver.

Amo kaj morto en Balio (1937) de Vicki Baum (1888-1960). El la germana tradukis P.H. Mooij. Roterdamo: UEA, 1986. 420p. Formato A5. ISBN 92 9017 033 6. Prezo: 28,50 gld. plus sendokostoj. Mendu de Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. (Rabato de unu triono por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj al la sama adreso.)